

BJALISTOKAJ KAJEROJ

BIALISTOKAJ KAJEROJ

N-RO 12

12-a literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn. Kio estas feliĉo por mi?”

12. konkurs literacki
„Esperanto łączy ludzi. Czym dla mnie jest szczęście?”

Organizatorzy konkursu „Esperanto łączy ludzi”
Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku
Białostockie Towarzystwo Esperatystów

Patronat honorowy
Prezydent Miasta Białegostoku



*Honorowy Patronat
Prezydenta
Miasta Białegostoku*

ISBN 978-83-66137-62-2
ISBN 978-83-962222-5-1

Wydawcy
Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego
ul. Marii Curie-Skłodowskiej 14A, 15-097 Białystok
www.ksiaznicapodlaska.pl

KSIĄŻNICA
PODLASKA

Białostockie Towarzystwo Esperantystów
ul. Piękna 3, 15-282 Białystok
www.espero.bialystok.pl



Jury konkursu
Tomasz Chmielik, Magdalena Sołowiej

Korekta
Antoine Cocard, Przemysław Wierzbowski

Projekt typograficzny, skład i łamanie
Przemysław Wierzbowski

Druk
Partner Poligrafia Andrzej Kardasz
ul. Szosa Baranowicka 77
15-523 Białystok, Grabówka

ANNA KOKOT-NOWAK

La lecionoj de feliĉo

La kurta tuŝeto de veluraj infanaj vangetoj, kovritaj per eretoj de la sunbrilo. Saniga koloro de la somera, malfrua posttagmezo – en la kvieta tono de matura tritiko, karamelo kaj la faluna ruĝo, inkrustita per flagrantaj lumeroj. La tuŝo, per teneraj fingropintoj de la fendita, kropaviga, plena de fascinaj tumoroj kaj elkreskaĵoj de surfaco sur la malnova pentraĵo, kovrita per la densa, malobeja farbo, metata per metala spatulo. La delogaodoro de cinamo, kardamomo, vanilo kaj kariofilo, loganta per la tentanta aromo, eliranta el la eno de la mia – plej ŝatata, gargantue granda – potego kun varmiga kakaoporcio. Susuroj, skrapado, fantasmaj murmuroj kaj sekreta magia sono de freŝe verdaj folioj, naskiĝantaj sur printempe florantaj arboj. La perlipa eligado de salitaj valvetoj de pistakoj. La tuŝado, per la varma lango, de malvarma surfaco de ĉokolada deserto, dum la varmega tago. La promeno per nudaj piedoj sur stranda sablo varmigita de suno.

La kurta, levita vosto de la hundido, vibranta en mia ĉeesto kiel frenezaj, gajaj mueliloj. La petolema okulumado de iu, kiun mi amas. La muslina kovrilekstero de interese ga libro, tralegi kiun mi jam delonge revadis. La kurba, ligna ŝtupo sur la verando de la avo Ignacy, el kies alto mi ŝatas rigardadi aŭgustajn sunsubirojn. La aspekto de glata, malvarma, neĝblanka paperfolio, antaŭ ol mi ĝin tuŝos per la pinto de mia plej ŝatata fontplumo. La feliĉon mi retrovas en etaj mirakloj de la ĉiutaga ekzistado, malgraŭ tio, ke ĝi tiel etas, ke mi devas helpuzi lupeon kun tre forta, pligrandiga vitro. Mi zorgeme provas meti tiujn delikatajn mikroerojn

sur la optimismoŝnureton, por krei el ili propran, poraverian kolieron de prospero. Ĝi ofte utilas en malfacilaj momentoj, kiam la feliĉo ŝtele preterpasas, eĉ por momento ne provante halti ĉe mi.

Mi kolektas el ĉiu travivita tago tiujn erojn de bono, restaĵojn de hazardaj sortoridoj, ridofragmentojn de fortuna, lignerojn de triumfo, cindrojn de hedonismo, restantajn vitrorubojn de feliĉomomentoj, argilaĵojn de sukcesoj, postrestaĵojn de benoj, cindrojn de profundaj preĝoj. La tutan disŝiritan kolekton de fragmentoj de surteraj ĝojoj – mi arigas en la malakita skatoleteto, funde de mia animo. Tie ĉi ruinaĵo de homaj spertoj maturiĝas, kreskas, kolektas forton, transformiĝas el la spertocindroj en valoregajn juvelaĵojn, relikvojn de la feliĉo.

Mi senavare kundividigas ilin kun ĉiu homo, kiun mi renkontas dum tiu surtera pilgrimado, direkte al la mita eterno. Mi donacas al senfortuloj esperon, kaj tio vekas lumon en iliaj ĝis nun estingitaj pupiloj, senigitaj de brilado. Mi viŝas per la fingropinto la larmon el infanaj okulharoj, mi dividigas mian tempon kun la maljunulino, kiu havas neniun por donaci sian varmon, mi forprenas kelkajn gramojn da soleco el la brakoj de tiuj, kiuj ĵus perdis iun proksimumon, mi provas kunmeti en la tuton, la kurtajn „mi” (*ego*) de vivrompitoj! Per la milda flustro, varma spirado, mi tuŝetas orelojn fermitajn por subtenovortoj... Mi pardonpetas unue al mi mem, kaj poste al tiuj, kiuj ne povas al si pardoni. Konforme al rekomendoj de la pozitivisma psikologio – mi trejnas la atentemon („ĉi tie kaj nun”), vigle rigardante sub la mikroskopo de la vidkapablo ĉiun forpasantan momenton. Neniu povas preterpasi de mi: ne rimarkita, ne pritaksita, neglektita per hasto, nervoziĝo aŭ ekscitiĝo. Samtempe mi provas ekzercadi en mi kurtigadon de la memoro pri miaj vundoj, eraroj, suferoj. Helpas al mi en tio mia plej ŝatata pentristo – superrealisto Salvador Dali, kies bildo „Stabileco de memoro” ĉiam denove pensigas min, ke en nia memoro ni lasas ĉefe tion, al kio ni mem donas signifon, kion ni deziras preni kun ni en la estonton.

Mi do faras ĉion, ke tiuj kontrabanditaj en la menson „pakaĵoj de la memoro” enhavu en si ĉefe bonajn, nutrantajn mian enon, internajn eventojn. Ke ili konstruu solidan spinon por mia delikata, virina psiko.

Samtempe mi konscias, ke ja en mia vivo gravas io pli, ol senĉese estadi feliĉa. Valoras por mia personeco sentado de la tuta, tre multaspekta emoci-gamo, do ankaŭ de: bedaŭro, tristo, kolerio. Problemoj ja finfine estas nur vivospicoj, kiuj plifortigas la guston, eligante el ĝi novajn enhavojn, kreante la nian mion.

Nur tiu plena fasko de sentoj konsistigas nian homan ekzistadon: plena kaj unusola. La filozofo Emil Cioran konsilus al mi bondezire, ke mi senutile ne retrofosu en la memoro, se mi volas feliĉi, sed mi preferas konservi en mia kapo ankaŭ la malfacilajn momentojn. Eble „la nigra suno” de la doloro, kiu foje en mi lumas, permesas la plenan floradon de mia psiko?

Mi provas paŝadi ĉiutage kun rigardo direktita en la estonton, ne en la pasinton. Mi flegas la psikan bonstaton (*well-being*) kiel ĥimeran kreskaĵon, sed samtempe mi invitas al mia propra spaco homojn, radiantajn per malfacilaj emocioj. Mi zorgas pri multjaraj amikrilatoj, konservataj de la infanaĝo, pruvitaj per sangovunditaj, kontuzitaj genuoj, sed mi ne fermas min al la novaj intelektaj kontaktoj.

Mi provas vivi engaĝita plene en sociajn kaj bonfarajn aktivaĵojn difinante firmajn fundamentojn, kiuj en la provomomentoj min retransviligas.

En la menso mi gvidas helplecionojn por atingi nur feliĉoskizojn, dum kiuj mi ĉiam denove lernas elekti esperon, en la momentoj de mal-espero. La feliĉo ja estas la scipovo de la plenkonscia elektado...

El la pola tradukis Jarosław Parzyszek

*I nagroda w konkursie literackim
„Esperanto łączy ludzi. Czym dla mnie jest szczęście?”*

ANNA KOKOT-NOWAK

Fakultety ze szczęścia

Ulotne muśnięcie aksamitnych policzków dziecka, oprószonych drobinami złotego, słonecznego blasku. Kojąca barwa letniego, późnego popołudnia – w łagodnej tonacji dojrzałej pszenicy, toffi i czerwieni faluńskiej, inkrustowana migotliwymi drobinami światła. Dotyk czułymi, wrażliwymi opuszkami palców spękanej, chropawej, pełnej fascynujących guzów i narośli powierzchni starego obrazu, malowanego gęstą, oporną farbą, nakładaną metalową szpachelką. Uwodzicielski zapach cynamonu, wanilii, kardamonu i goździków, wabiący kuszącym aromatem, sączący się z wnętrza mojego ulubionego, gargantuicznego w rozmiarze kubka z ciepłą porcją rozgrzewającego kakao. Szelesty, chrobotania, fantasmagoryczne mamrotki oraz tajemne, magiczne brzmienie świeżych, zielonych listków, które rodzą się na wiosennie rozkwitłych drzewach. Wyłuskiwanie wargami z posolonych łupinek chrupiących orzeszków pistacjowych. Dotyk rozgrzanym językiem zimnej powierzchni czekoladowego deseru w upalny dzień. Spacer bosymi stopami po uprażonym słońcem, plażowym piasku. Krótki, zadziorny ogon szczeniaczka, kręcący na mój widok szalone, radosne młynki. Filuterne mrugnięcie okiem kogoś, kogo kocham. Muślinowa w dotyku faktura okładki frapującej książki, o której przeczytaniu marzyłam od dawna. Krzywy, drewniany schodek na werandzie dziadka Ignacego, z którego wysokości lubię oglądać sierpniowe zachody słońca. Widok gładkiej, chłodnej, śnieżnobiałej kartki papieru, zanim dotknę jej stalówką ulubionego wiecznego pióra.

Szczęście odnajduję w maleńkich cudach codziennej egzystencji, choć czasami jest tak maciupkie, że muszę pomagać sobie lupą z silnym szkłem powiększającym. Ostrożnie staram się nanizac te kruche, miniaturowe drobiny na sznurek otuchy, by móc z nich stworzyć swój awaryjny naszyjnik pomyślności. Przydaje się w cięższych chwilach, gdy szczęście chyłkiem przemyka, nawet nie starając się zatrzymać przy moim boku.

Zbieram z każdego przeżytego dnia te okruchy dobrodziejstw, szczątki przypadkowych uśmiechów losu, odłamki chichotów fortuny, drzazgi triumfu, prochy hedonizmu, pośluczone resztki szczęśliwych trafów, skorupy sukcesów, kikuty błogosławieństw, prochy serdecznych modlitw. Całą poszarpaną kolekcję ułomków ziemskich radości – magazynuję w malachitowej szkatułce na dnie duszy. Tam owo rumowisko ludzkich doświadczeń dojrzewa, pęcznieje, nabiera nocy, przeobraża się ze zgliszczy doznań w bezcenne precjoza, relikwie szczęścia.

Dzielę się nimi hojną dłońią z każdym człowiekiem, którego spotykam podczas tego ziemskiego pielgrzymowania ku mitycznej wieczności. Ofiaruję bezradnym nadzieję, a to wzbudza światło w ich zgasłych dotąd źrenicach, pozbawionych blasku. Ocieram opuszką palca łzę z rzęs dziecka, dzielę się wolnym czasem ze starszą kobietą, która nie ma kogo obdarować swoim ciepłem, ujmuję parę deko samotności z ramion tych, którzy stracili niedawno kogoś bliskiego, próbuję poskładać w całość kruchuteńkie ego złamanych życiem. Łagodnym szeptem, ciepłym oddechem muskam uszy zamknięte na słowa wsparcia. Przebaczam sobie, a potem i tym, którzy sami sobie przebaczyć nie mogą. Jak zaleca psychologia pozytywna – trenuję uważność („tu i teraz”), czujnie przyglądając się pod mikroskopem wzroku każdej mijającej chwili. Żadna nie może wyminąć mnie niezauważona, niedoceniona, zbagatelizowana pośpiechem, nerwowością czy irytacją. Jednocześnie staram się ćwiczyć w sobie krótką pamięć względem moich urazów, błędów, cierpienia. Pomaga mi w tym ulubiony malarz surrealista Salvador Dali, którego obraz „Trwałość pamięci” wciąż na nowo uzmysławia mi, że zachowujemy w umyśle przede wszystkim to, czemu sami nadamy znaczenie, co zapragniemy

zabrać ze sobą do przyszłości. Robię więc wszystko, by te moje przemyczone w umyśle „pakunki pamięci”, mieściły w sobie przede wszystkim dobre, karmiące mnie wewnątrz zdarzenia. By stanowiły solidny kręgosłup dla mojej ażurowej, kobiecej psychiki.

Jednocześnie zdaję sobie sprawę, że przecież w moim życiu chodzi o coś więcej, niż tylko o bycie permanentnie szczęśliwym. Wartościowe dla mojej osobowości jest odczuwanie całej, tej tak bogatej gamy emocji, a więc także żalu, smutku, złości. Kłopoty to w końcu życiowe przyprawy, nadają mu głębszego smaku, wydobywają z niego nowe treści, kształtują nasze jestestwo. Dopiero ten cały amalgamat doznań czyni naszą ludzką egzystencję pełną i unikatową. Filozof Emil Cioran doradziłby mi życzyliwie, bym nie gmerała niepotrzebnie w pamięci, jeśli pragnę być dogłębnie szczęśliwa, ale ja chcę przechowywać w głowie także trudne momenty. Być może „czarne słońce” bólu, które czasami we mnie świeci, pozwala mi na rozkwit pełni psyche?

Staram się kroczyć przez codzienność ze wzrokiem skierowanym do przodu, a nie w przeszłość. Pielęgnuję dobrostan psychiczny (czyli *well-being*) jak chimeryczną roślinkę, ale jednocześnie zapraszam do osobistej przestrzeni ludzi, którzy emanują trudnymi emocjami. Być może to ja będę potrafiła im pomóc się z nimi uporać? Dbam o wieloletnie przyjaźnie, jeszcze z czasów dzieciństwa, znaczonego obdartymi do krwi, posiniaczonymi kolanami, ale nie zamykam się i na nowe kontakty intelektualne. Usiłuję wieść życie zaangażowane w akcje społeczne, charytatywne, ustaliam trwałe fundamenty, które przynoszą mi spokój w momentach próby. Prowadzę w umyśle autorskie fakultety z osiągnięcia choćby zarysu szczęścia, podczas których wciąż na nowo uczę się wybierać nadzieję w beznadziei. Szczęście to przecież także kwestia świadomego wyboru...

MARIA ROSARIA SPANÒ

Geometrio

Dimanĉo: enua tago, kiel ĉiuj dimanĉoj. Kiel ĉiuj festotagoj.

Hodiaŭ por Roza estas eĉ pli ĝena tago, ĉar ŝi devas plenumi verkotaskon.
„Viaj verkotaskoj estas mirinde belaj kvadratoj, sed ili devus iĝi kuboĵ”.

La enigma sugesto kiun Paŭla, ŝia adorata instruistino, donis al ŝi antaŭ du tagoj, kirliĝadas en la menso de Roza. La knabineto ne plencertas ĉu ŝi bone komprenis, sed ŝi certas ke ŝi tute ne volas verki. Iam ŝi kaŝe legis la malgajajn, nostalgiajn poemojn kiujn ŝia patrino verkis sur tiu eta notlibro, tiu bone kaŝita en noktotabla tirkesto, sub kvitancoj kaj poŝtkartoj. Tiam ŝi eksentis ke verkado estas io kio suferigas, io per kio oni surpaperigas ion valoran, ion kion ĉiuj povos legi, miskompreni, kaj primoki. Certe tial ŝia patrino ĉesis verki antaŭ longa tempo, antaŭ la naskiĝo de Roza.

„Viaj verkotaskoj estas mirinde belaj...”. Ĉu ne sufiĉus diri tion? Kial postuli pli?

Roza ne volas seniluziigi Paŭlan, ĉar ŝi estas la plej bona instruistino kiun ŝi iam ajn havis: ŝi estas komprenema, atentema, ŝi interesiĝas pri ĉiuj voĉoj, pri ĉiuj pensoj de siaj gelernantoj. Ŝi estas speciala. Tamen, tiu tute neatendita, geometria peto vere angorigas Rozan. La antaŭan nokton, ŝi eĉ havis koŝmaron: ŝi sonĝis fali en kubforman naĝejon, kaj ŝi timegis droni.

Ŝi suspiras kaj malfermas la nigran valizeton kie ŝia sangkolora skribmaŝino Olivetti delonge kuŝas, neniam tuŝita; ĝi estas donaco de ŝiaj plej amataj geonkloj, kiuj bedaŭrinde loĝas tro for.

La skribmaŝino devenas de lando, Jugoslavio, kiu ne plu ekzistas. Oni devos ŝanĝi ĝiajn mapojn, samkiel okazis pri Germanio, kiu tamen reunuiĝis. Metinte la skribmaŝinon sur sian skribotablon, Roza karesas ĝiajn klavojn, kaj ĝiaj metalaj marteletoj moviĝas, apenaŭ perceptebla. „Nu, espereble ĝi ne tro bruos” Roza pensas, timeme. Ne la metala tajpbruo en si mem estas problemo, sed ĝia signifo, ĉar tiel estos evidente, ke ŝi tajpas ion. Ke ŝi verkas ion. Kaj ŝi ne volas, ke ŝia patrino rimarku tion.

Ŝi enmetas paperfolion en ĝin – la geonkloj ja instruis al ŝi kiel funkciigi ĝin –, kaj ekpripensas.

Vortoj aperas sur la folio.

Perdi sian hejmon estas terure. La lando kie mi naskiĝis ne plu ekzistas, kaj nuntempe milito disŝiras ĝin. Hodiaŭ tamen mi feliĉas, ĉar Roza decidis finfine malfermi la nigran valizeton kie mi malgaje kaj nostalgie longe kuŝis, kaj ekaŭskultis min.

Ŝi neniam uzis min ĝis nun, kvankam mi estas nova kaj ruĝkolora.

Eble ŝi ne ŝatas la bruon kiun mi eligas dum tajpado, sed mi estas skribmaŝino, mi ne povas funkcii alimaniere. Kiam iu tajpas, mi ĝojas. Ne estas bruo, sed ĝojkrio.

Roza surprizite ridetas, kiel antaŭ nekonata, alloga ludo: ŝi antaŭe ne imagis, ke pensoj kaj voĉo de skribmaŝino iam povu vere surpaperigi.

Mi pensas, ke hodiaŭ Roza aparte enuas. Dimanĉe, ŝi ĉiam enuas. Ŝi ŝatus iri eksteren: estas suno, kaj verdaj parkoj atendas ŝin. Sed ŝi ne rajtas iri tien sola, kaj neniu akompanus ŝin. Ĉiuj ŝiaj festotagoj estas same grizaj kaj malplenaj, ĉar ŝia patrino delonge ĉesis rideti.

Kutime Roza plenumas siajn hejmtaskojn, sed hodiaŭ ne. Eble ŝi klopodas kompreni ion, kion Paŭla, la instruistino, diris al ŝi.

Roza estas tre diligenta, sed ŝi hontas pri siaj emocioj. Tial ŝi malamas verkotaskojn: ŝi timegas, ke io kio apartenas al ŝi restos surpapere, kaj ke la aliaj ne komprenos, aŭ simple primokos ŝin.

Ŝi tute ne komprenas, ke verkado estas ludo, danke al kiu ŝi povas iĝi iu alia, vivi alian vivon.

Roza subite repensas pri sia koŝmaro: en kuban basenon oni ja povas fali, eĉ droni, sed oni povas ankaŭ kaŝi sin mem, aŭ eble trezoron, eble sekreton. Aŭ ĉion ĉi. En kvadraton, ne nepre. Kvadrato povas esti bunta faco de kubo, de Rubik-kubo, aŭ resti nur dudimensia surfaco.

La enketema voĉo de ŝia patrino interrompas ŝiajn pensojn; Roza respondas ke ŝi nur volas certiĝi ĉu la skribmaŝino daŭre funkcias, ĉar ŝi neniam uzis ĝin.

La verkado daŭras ĝis la fino de la posttagmezo kaj de la folio. Roza elektas titolon: *Taglibro de skribmaŝino*. Poste, ŝi enŝovas la folion en unu el siaj kajeroj kaj kaŝas ĉion en sian dorsosakon.

Nokte, ŝi sonĝe flosas en la kubforma naĝejo; de tempo al tempo ŝi ludeme mergiĝas sub la surfacon.

Matene, Roza vekigigas kun trankvila rideto survizaĝe. Ŝia bona humoro mirigas ŝian patrinon, kiu tamen ne komentias.

Klasĉambre, la knabineto lasas la folion sur la katedro kaj iras sidiĝi.

Kiam Paŭla, la instruistino, ekvidas la tajpitan folion, ŝi ridetas al Roza, komplace; ŝi legas, kaj poste skribas ion sur la folio, per verdinka skribilo, ĉar ŝi neniam uzis ruĝan kiel ĉiuj ceteraj instruistinoj.

Post la leciono, Paŭla redonas la folion al Roza, kiu rapide reenmetas ĝin en la kajeron, kaj la kajeron en la dorsosakon.

Hejme, en sia ĉambro, kaŝe ŝi legas: *Bonvenon al la tridimensia mondo*.

La koro de Roza ekbatas pli intense, ĝojridado aperas sur ŝia vizaĝo.

Ĉu tiu ĉi sento estas feliĉo, Roza ne plencertas, sed dum ŝi denove karesas la klavojn de sia skribmaŝino, ŝi sentas ke nenio estas pli ĝojiga ol verki historiojn.

Historioj inter kies linioj eblas libere kaŝiĝi.

*I nagroda w konkursie literackim
„Esperanto łączy ludzi. Czy dla mnie jest szczęście?”*

MARIA ROSARIA SPANÒ

Geometria

Niedziela: dzień nudny jak wszystkie niedziele. Jak wszystkie dni wolne.

Ten dzień drażni Różę tym bardziej, że ma do wykonania zadanie pisemne.

„Twoje teksty są niezwykle piękne; to kwadraty, które powinny stać się sześcianami”.

Zagadkowa sugestia, którą Paula, uwielbiana przez nią nauczycielka, dała jej dwa dni temu, kołtuję się w głowie Róży. Dziewczynka nie jest do końca pewna, czy dobrze zrozumiała, jednak wie, że w ogóle nie chce jej się pisać. Któregoś razu ukradkiem przeczytała smutne, nostalgiczne wiersze, które matka pisała w tym małym notesie, dobrze schowanym wśród rachunków i pocztówek. Wtedy poczuła, że pisanie jest czymś przynoszącym cierpienie, czymś umożliwiającym przeniesienie na papier rzeczy cennych – czegoś, co każdy będzie mógł przeczytać, błędnie zrozumieć i wyśmiać. Pewnie dlatego matka przestała pisać dawno temu, przed narodzinami Róży.

„Twoje teksty są niezwykle piękne...”. Nie wystarczyło tak powiedzieć? Po co wymagać więcej?

Róża nie chce rozczarować Pauli, która jest najlepszym nauczycielem, jakiego Róża kiedykolwiek miała: wyrozumiała, uważna, interesująca wszystkie głosy, wszystkie myśli jej uczniów. Jest wyjątkowa. Jednak ta zupełnie nieoczekiwana geometryczna prośba naprawdę przeraża Różę. Zeszłej nocy miała nawet koszmar: śniła, że wpada do szczęśliwego basenu i strasznie boi się utonięcia.

Róża wzdycha i otwiera czarną walizeczkę, w której od dawna leży jej krwistoczerwona maszyna do pisania Olivetti, nigdy nie używana; to prezent od ukochanych wujostwa, którzy niestety mieszkają za daleko.

Maszyna pochodzi z kraju, który już nie istnieje, z Jugosławii. Trzeba będzie zmienić jej mapy, tak jak stało się z Niemcami, które jednak się zjednoczyły. Położywszy maszynę na biurku Róża gładzi jej klawisze, a metalowe młoteczki poruszają się prawie niezauważalnie. „Oby nie robiła za dużo hałasu” – ze strachem myśli Róża. Nie tyle sam metaliczny odgłos maszyny jest problemem, ile jego znaczenie, bo przez to będzie jasne, że coś pisze. Że coś tworzy. A nie chce, żeby matka to zauważyła.

Wkłada do maszyny papier – wujostwo nauczyli ją, jak działa – i zaczyna obmyślać.

Na papierze pojawiają się słowa.

Utrata domu jest straszna. Kraj moich urodzin już nie istnieje, a teraz rozrywa go wojna. Dziś jednak jestem szczęśliwa, bo Róża nareszcie postanowiła otworzyć czarną walizeczkę, w której długo leżałam przepętniona smutkiem i nostalgią, i zaczęła mnie słuchać.

Do tej pory nigdy mnie nie używała, chociaż jestem nowa i krwistoczerwona.

Może nie lubi hałasu, który robię podczas pisania, ale jestem przecież maszyną, inaczej nie mogłabym działać. Cieszę się, gdy ktoś pisze. To nie hałas, to okrzyk radości.

Róża uśmiecha się zaskoczona, jak przed nieznaną, ujmującą grą: nigdy wcześniej nie myślała, że myśli i głos maszyny do pisania mogą być przelane na papier.

Wydaje mi się, że dziś Róża jest szczególnie znudzona. Nudzi się każdej niedzieli. Chciałaby wyjść; świeci słońce, czekają na nią zielone parki. Ale nie wolno jej tam iść samej, a nikt nie będzie jej towarzyszył. Wszystkie jej dni wolne są tak samo szare i puste, bo matka już dawno temu przestała się uśmiechać.

Zazwyczaj Róża ma odrobione lekcje, ale nie dziś. Może stara się zrozumieć coś, co Paula, nauczycielka, jej powiedziała.

Róża jest bardzo inteligentna, ale wstydzi się swoich emocji. Dlatego nie znosi zadań pisemnych: strasznie się boi, że coś, co należy do niej, pozostanie na papierze, i że inni tego nie zrozumieją, albo po prostu ją wykpią.

Zupełnie nie rozumie, że pisarstwo to gra, dzięki której może stać się kimś innym, żyć odmiennym życiem.

Nagle Róża wraca myślami do swojego koszmaru: co prawda do sześciennego basenu można wpaść, nawet utonąć, ale można się tam też ukryć, albo schować skarb lub tajemnicę. Albo wszystko to razem. W kwadracie – niekoniecznie. Kwadrat może być pstrokatą ścianą sześcianu, kostki Rubika, albo pozostać jedynie dwuwymiarową powierzchnią.

Wypytyjący głos matki przerywa jej myśli; Róża odpowiada, że chce się tylko upewnić, czy maszyna nadal działa, ponieważ nigdy z niej nie korzystała.

Pisanie trwa do końca popołudnia i do końca kartki. Róża wybiera tytuł: *Dziennik maszyny do pisania*. Następnie wsuwa kartkę do jednego z zeszytów i chowa wszystko do plecaka.

W nocy w śnie unosi się na powierzchni sześciennego basenu; od czasu do czasu swawolnie zanurza się w wodę.

Następnego poranka Róża budzi się ze spokojnym uśmiechem na twarzy. Dobry humor dziwi matkę, która jednak tego nie komentuje.

W klasie dziewczynka kładzie kartkę na biurku nauczyciela i wraca do ławki.

Kiedy nauczycielka Paula zauważa zadrukowaną kartkę, uśmiecha się poufnie do Róży; następnie pisze coś na arkuszu, zielonym długopisem, ponieważ nigdy nie używa czerwonego tuszu, jak reszta nauczycieli.

Po lekcji Paula oddaje kartkę Róży, która pospiesznie chowa ją do zeszytu, a ten – do plecaka.

W domu, w swoim pokoju Róża po kryjomu czyta: *Witaj w trójwymiarowym świecie*.

Serce Róży zaczyna bić szybciej, na twarzy pojawia się radosny uśmiech.

Czy to uczucie jest szczęściem – Róża nie jest pewna, jednak gdy znowu gładzi klawisze swojej maszyny czuje, że nic nie sprawia takiej radości, jak pisanie historii.

Historii, między wierszami których można się swobodnie ukrywać.

Z esperanta tłumaczył Przemysław Wierzbowski

HANNA SHYKUTS

Esti survoje

Feliĉo por mi estas sekvi la vojon. Kaj ĉi tiuj vojoj estas vere malsamaj!...

Mi marŝas laŭ pado en la arbaro de Supraslo. La suno tralumas la branĉojn de arboj. Silento. La krakadon de branĉoj mi aŭdas sub la piedoj. Birdoj kantas. Mi frostas antaŭ la harmonio de la naturo.

Mi estas en aŭtomobilo. Kun la tuta familio ni iras al Francio, al la oceano. Survoje mi vidas montetojn, la ŝutrojn de domoj en urbetoj, ĉielarkon sur la ĉielo. Mi ankaŭ laŭte legas libron. Tre interesa libro – Ray Bradbury aŭ Maria Parr. Aŭ Kate DiCamillo. Aŭ „Mallonga historio de Belorusio“. La edzo plezure aŭskultas, la adoleskantoj iom enuas. Sed mi scias, ke ĉi tiu vojo estos memorata de ni ĉiuj eĉ pli ol la restado ĉe la oceano. La antaŭgojo ĉiam estas pli interesa ol la evento mem. Ni estas survoje.

Mi ŝanĝas karierojn. Mi iras laŭ tute malsamaj vojoj. Mi studis ĉe la Fizika kaj Teknologia Liceo. Kaj la mondo de nombroj, formuloj, leĝoj estis la plej komprenebla. En la universitato mi diplomiĝis pri filologio, mi estis instruisto pri la rusa lingvo kaj literaturo. Ŝajnis al mi, ke la mondo de vortoj helpas la homojn esti feliĉaj. Poste mi eniris televidon: filmadon, scenarojn, sed plej grave – renkontiĝojn kun diversaj homoj – tion donis al mi tiu laboro. Estis feliĉe.

Nova maniero: dum 7 jaroj mi estas dungito de bonfara organizo. Infanoj kaj adoleskantoj kun kancero – iliaj okuloj, iliaj maldikaj manoj, iliaj senharaj kapoj kaj la nekredebla soifo de vivo en ĉiuj – tio estas

valorega sperto akcepti homon. Fremdulo, kiu subite fariĝas kara. Mi konstatis, ke mi povas fari ion por elvoki rideton de tiuj uloj. Sed plej grave: tiuj homoj donis al mi la senton de „esti bezonata”.

Nun mi loĝas en Pollando. Granda ŝanĝo en la vivo. Mi laboras kiel instalisto de elektraĵoj. Kaj mi faras la unuajn paŝojn por lerni la polan lingvon. Kaj mi interesiĝas pri la lingvo Esperanto, ankaŭ ĉar la vivo de ĝia kreinto, Ludoviko Zamenhof, ligas por mi mian denaskan Grodnon kun Bjalistoko. Jen mia nova vojo en la vivo, nova sperto, nova feliĉo.

Feliĉo estas bezonata de homoj.

Feliĉo estas starigi novajn celojn.

Feliĉo estas iri. Mergi vin en novaj aferoj, akiri sperton.

Feliĉo estas vivi.

Mi ĝojas, ke mi havas la ŝancon paroli pri ĝi. Dankon al la invitletero por partopreni la konkurson. Dankon al vortaroj. Dankon al la kuraĝo, kiun mi havas. Al la deziro vidi kiel tio estos skribita kaj kiel sonos en Esperanto.

*III nagroda w konkursie literackim
„Esperanto łączy ludzi. Czy dla mnie jest szczęście?”*

HANNA SHYKUTS

Być w drodze

Szczęściem dla mnie jest być w drodze. A te drogi-ścieżki są różne!...

Idę ścieżką w lesie Supraśla. Słońce przebija się przez drzewa. Cisza. Trzask gałęzi pod stopami. Ptaki śpiewają. Zamieram przed harmonią natury.

Jestem w samochodzie. Z całą rodziną jedziemy do Francji, nad ocean. Po drodze udaje mi się zobaczyć wzgórza, okiennice domów w małych miasteczkach, tęczę na niebie. Poza tym czytam książkę. Bardzo ciekawą książkę: Ray Bradbury albo Maria Parr. Albo Kate DiCamillo. Albo „Krótką historię Białorusi”.

Mąż słucha z przyjemnością, nastoletnie dzieci trochę się nudzą. Ale wiem, że ta droga zostanie zapamiętana przez nas wszystkich nawet bardziej niż bycie nad samym oceanem. Oczekiwanie jest zawsze ciekawsze niż samo wydarzenie. Jesteśmy w drodze.

Szukam mojego zawodu. Idę tak różnymi ścieżkami. Kiedyś uczyłam się w Liceum Fizyki i Techniki i świat liczb, wzorów, praw był najbardziej zrozumiały. Na uniwersytecie ukończyłam filologię, byłam nauczycielem języka i literatury rosyjskiej. Wydawało mi się, że świat słów pomaga ludziom być szczęśliwymi.

Potem dostałam się do telewizji: filmowanie, scenariusze, ale co najważniejsze – spotkania z różnymi ludźmi – to właśnie dała mi ta praca. To było szczęście.

Nowa droga: od 7 lat jestem pracownikiem organizacji charytatywnej. Dzieci i młodzież z chorobą nowotworową – ich oczy, chude ręce,

bezwłose głowy i niesamowite pragnienie życia u wszystkich – to bezcenne doświadczenie zaakceptowania człowieka. Nieznajomi, którzy nagle stają się dla ciebie bliscy. W pewnym momencie mojego życia zdałam sobie sprawę, że mogę zrobić coś, żeby te dzieci się uśmiechnęły. Ale co najważniejsze: to właśnie ci ludzie dali mi poczucie „bycia potrzebną”.

Teraz mieszkam w Polsce. Wielki zwrot w życiu. Pracuję jako monter urządzeń elektrycznych. Stawiam pierwsze kroki w nauce języka polskiego. A język esperanto mnie interesuje, także dlatego, że życie jego twórcy, Ludwika Zamenhofa, łączy dla mnie moje rodzinne Grodno i Białystok. To moja nowa ścieżka w życiu, nowe doświadczenie, nowe szczęście.

Szczęście – być potrzebnym ludziom.

Szczęście to wyznaczanie nowych celów.

Szczęście jest w słowach „Krok naprzód! Zanurz się w nowych rzeczach, zdobądź doświadczenie”.

Szczęściem jest żyć.

Cieszę się, że mam okazję o tym opowiedzieć. Dzięki zaproszeniu do udziału w konkursie. Dzięki słownikom. Dzięki odwadze, którą mam. Poprzez pragnienie zobaczenia, jak zostanie to napisane i jak zabrzmi w esperanto.

MONIKA CZARNOWSKA

Feliĉa-malfeliĉa homo

Ili veturis per aŭtomobilo tra ŝtopita urbo. Bofilino kun bopatro. Ili rapidiĝis. Johano hodiaŭ komencos radioterapion kaj ĝuste hodiaŭ pasis duono de jaro de kiam li ekaŭdis la verdikton – kancero.

Povus ŝajni, ke la diagnozo povas ŝanĝi nenion en lia situacio, ĉar kion povas atendi okdekjarulo de la sorto? Oni scias, morton. Ĝis antaŭ nelonge ŝajnis al li, ke li jam akceptis la tempopasadon. Li estis certa, ke mortos same kiel lia edzino – iun tagon li ekdormos kaj ne vekigos sekvontage. Li ne antaŭvidis, ke la lastajn kilometrojn de sia maratono li pasigos en hospitaloj, iniciita pro la kuracado kaj batalo pri ĉiu sekva tago. La malsano ŝanĝis ankaŭ lian percepton de forpaso de tempo. Nun li sentis, ke mankas tempo por li kaj li devas rapidiĝi.

Malrapide ili veturis antaŭen, pasis minutoj kaj al ili ŝajnis, ke ili staras en la sama loko. Ili ne interparolis, estis okupitaj per propraj pensoj, senkonsciaj, ke ili pensas same. „Se mi malfruos, mi maltrafos lokon en la vico kaj denove devos atendi”. „Ĉu li havas tempon por atendi?”. Subite ili ambaŭ ekvidis du virinojn sidantajn sur benko ĉe bushaltejo. Ili interparolis per gestolingvo.

– Rigardu, kiaj ili estas malfeliĉaj – Johano interrompis silenton.

– De kie vi scias? Vi opinias ilin malfeliĉaj ĉar ili ne aŭdas same kiel vi kaj mi? Vi ne povas scii tion. Tio, kio por vi estas la fino de la mondo por iu alia tute ne devas esti. Eble ili estas pli feliĉaj ol ni – respondis Anita.

– Mi ne scias. Eble vi pravas.

Ili ambaŭ eksilentis. Postmomente Anita demandis: Kio por vi estas feliĉo? Johano daŭre observis la virinojn, kiuj ridetante interparolis. Li ne respondis. Anita ne certis, ĉu li aŭdis ŝian demandon. Ŝajnis al ŝi, ke liaj pensoj estis ie for. De tempo al tempo tiam li ridetis, de tempo al tempo li kaŝe forviŝis larmojn. Hodiaŭ nenion ŝi povis ellegi de lia vizaĝo. Ŝi ne ŝatis lacigi lin per demandoj similaj al tiuj, kiujn oni uzas en gabineto de psikoterapeŭto. Ŝi sciis, ke por li nun estas malfacilaj momentoj. Ĉi tio daŭris de la tempo, kiam mortis lia edzino Johanina kaj neatendita lia malsano pli fortigis lian depresion. Ŝi certis, ke ilia interparolo jam estas finita, komencis observi aŭtomobilon, kiu staris antaŭ ili. Sed subite ŝi ekaŭdis mallaŭtan voĉon de Johano:

– Kelkfoje mi estis feliĉa en mia vivo. Temas pri momentoj, kiam en la infanaĝo dum ferioj mi naĝis en rivero kun mia frato, kiam mia patrino bakis gistan kukon, kiam la patro instruis min bicikli. – Li eksilentis kaj postmomente daŭrigis: – Kiam mi konatiĝis kun Johanina, kiam naskiĝis Marko kaj kiam ni kune loĝis en ĉi tiu etvasta loĝejo. Tiuj kaj multaj aliaj momentoj. Tiaj banalaĵoj, sed ili konsistigas mian tutan vivon. Kiam nun mi pensas pri ĉio ĉi, mi konkludas, ke tio, kion ni nomas feliĉo, ŝanĝiĝas dum forpaso de jaroj. Dum diversaj momentoj de nia vivo ni deziras ion alian kaj ofte ni ne rimarkas, ke feliĉo venas al ni ĉiutage.

Anita silentis. Liaj vortoj tiel impresis ŝin, ke dum longa tempo ŝi ne sciis, kion respondi. Ŝi nur observis lian profilon.

– Ankoraŭ hodiaŭ matene mi dirus, ke estos feliĉo kiam oni kuracos min, kiam mi mortos en la propra lito. Ĵus mi komprenis, ke mi feliĉas, ĉar mi havas vin kaj mi ne estas sola. Kaj tio, ke vi veturigas min al kuracistoj, signifas por mi multe. Li turnis la kapon de la fenestro, enrigardis ŝiajn okulojn kaj aldonis per tremanta voĉo: – Dankon.

Kortuŝita Anita ridetis. La konfeso de Johano malrapide atingis ŝian koron. Ŝi kaptis lian manon kaj forte premis ĝin. Jam ŝi sciis, kion ŝi ŝatus diri.

– Antaŭ momento vi dubis pri feliĉo de ĉi tiuj virinoj, sed viaj vortoj malkaŝas tion, ke ĝuste homo estas la fonto de feliĉo por alia homo. Ili

interparolas, ili „aŭdas” unu la alian. Kaj por ili ĝuste tio povas esti feliĉo, pri kiu vi diris. Povi promeni kun amikino, esti aŭskultata, ne nepre per laŭte diritaj vortoj. Feliĉo estas tiam, kiam alia persono rimarkos vin. Feliĉo estas tempo kaj atento, kiun iu donacos al vi.

Johano ridetis. Feliĉa-malfeliĉa homo. Ili daŭre staris sur la ŝtopita vojo sed li sentis sin tiel, ke li havasflugilojn kaj komencis flugi. Forpaso de tempo jam por li ne gravis, li jam ne rapidiĝis.

El la pola tradukis Nina Pietuchowska

MONIKA CZARNOWSKA

Szczęśliwy-nieszczęśliwy człowiek

Jechali samochodem przez zakorkowane miasto. Synowa z teściem. Spieśzyli się. Jan zaczynał dziś radioterapię i to właśnie dziś mijало pół roku, odkąd usłyszał wyrok – nowotwór.

Wydawać by się mogło, że diagnoza nie powinna niczego zmienić w jego położeniu, bo czego może spodziewać się od losu osiemdziesięciolatek? Wiadomo, śmierci. Do niedawna zdawało mu się, że pogodził się z upływem czasu, ale był pewien, że umrze tak, jak jego żona – któregoś dnia zaśnie i się nie obudzi. Nie przewidział, że ostatnie kilometry swojego maratonu spędzi w szpitalach, wycieńczony leczeniem i walką o każdy kolejny dzień. Choroba zmieniła również sposób odczuwania przez niego upływającego czasu. Teraz miał poczucie, że ciągle mu go brakowało, że musi się spieszyć.

Przesuwali się powoli w korku, minuty pędziły, a oni jakby stali w miejscu. Nie rozmawiali, byli zajęci własnymi myślami, nieświadomi, że tak naprawdę rozważają to samo. „Jeśli nie dojadę na umówioną godzinę, moja kolejka na pewno przepadnie, będę musiał znowu czekać”. „Czy on ma czas na czekanie?”. Nagle ich wzrok przyciągnęły dwie kobiety siedzące na przystanku. Rozmawiały w języku migowym.

– Spójrz, jakie one są nieszczęśliwe – Jan przerwał ciszę.

– Skąd wiesz? Uważasz, że są nieszczęśliwe, bo nie słyszą tak jak ty czy ja? Nie możesz tego wiedzieć. To, co dla ciebie jest końcem świata, dla kogoś innego wcale nie musi być. Może są szczęśliwsze od nas – odparła Anita.

– Nie wiem. Może masz rację.

Zamilkli oboje. Po chwili Anita zapytała: – A czym dla ciebie jest szczęście?

Jan nadal wpatrywał się w uśmiechnięte, pogrążone w rozmowie kobiety. Nie odpowiadał. Anita nie miała pewności, czy usłyszał jej pytanie. Widziała go ostatnio często w tym stanie. Sprawiał wrażenie, jakby błądził myślami gdzieś daleko, czasem się wtedy uśmiechał, czasem ukradkiem wycierał łzy. Dziś również nie mogła nic wyczytać z jego twarzy. Nie chciała go męczyć pytaniami rodem z gabinetu psychoterapeuty. Wiedziała, że przechodził trudne chwile. To trwało, odkąd zmarła jego żona Janina, a niespodziewana choroba załamała go jeszcze bardziej. Pewna, że rozmowa zakończona, utkwiała wzrok w samochodzie stojącym przed nimi, gdy nagle usłyszała cichy głos Jana:

– Kilka razy w życiu byłem szczęśliwy. To były momenty, gdy w dzieciństwie podczas wakacji kąpałem się z bratem w rzece, gdy mama upiekła ciasto drożdżowe, gdy tata uczył mnie jeździć rowerem. – Zamilkł i po chwili kontynuował: – Gdy poznałem Janinę, gdy urodził się Marek i gdy później zamieszkaliśmy razem w tym ciasnym mieszkaniu. Te i wiele innych chwil. Takie banały, ale złożyły się na całe moje życie. Trochę się tego nazbierało. Jak teraz o tym wszystkim myślę, to dochodzę do wniosku, że to, co nazywamy szczęściem, zmienia się z biegiem lat. W różnych momentach życia pragniemy czegoś innego i często nie zauważamy, że szczęście przytrafia nam się codziennie.

Anita milczała. Jego słowa zrobiły na niej wrażenie do tego stopnia, że przez dłuższą chwilę nie wiedziała co powiedzieć. Wpatrywała się jedynie w jego profil.

– Jeszcze dziś rano powiedziałbym, że szczęściem będzie, jak mnie wyleczą, albo jak umrę we własnym łóżku. Właśnie zrozumiałem, że jestem szczęśliwy, bo mam was i nie jestem sam. A to, że wozisz mnie do lekarzy, wiele dla mnie znaczy. – Odwrócił wzrok od szyby, spojrzął w jej oczy i dodał drżącym głosem: – Dziękuję.

Anita wzruszona odwzajemniła uśmiech. Wyznanie Jana powoli docierało do jej serca. Złapała go za dłoń i mocno ścisnęła. Już wiedziała, co chce powiedzieć.

– Wątpiłeś przed chwilą w szczęście tych kobiet, a z twoich słów wynika, że to właśnie człowiek jest źródłem szczęścia drugiego człowieka. One rozmawiają, „słyszają się” nawzajem. I dla nich mogą to być chwile szczęścia, o których mówiłeś. Móc wyjść na spacer z przyjaciółką i być usłyszaną, niekoniecznie za pomocą wypowiedzianych na głos słów. Szczęściem jest bycie dostrzeżonym przez drugą osobę. Szczęście to czas i uwaga, którą ktoś ci podaruje.

Jan uśmiechnął się. Szczęśliwy-nieszczęśliwy człowiek. Dalej stali w korku, ale on poczuł, jakby dostał skrzydeł i leciał. Upływ czasu przestał mieć dla niego znaczenie, już się nie spieszył.

BARTOSZ DŁUBAŁA

Feliĉo

Nian hotelon ni atingus post dek minutoj, eble post dekunu kaj duono laŭ horloĝo. La suno jam kliniĝis al la sunsubiro, sed mi ankoraŭ ne volis reveni. Mi ŝatis niajn posttagmezojn sur strando pro la murmuro de marondoj. En loko, kie ni loĝis, ĝi ne estis aŭdebla. Eble por tiuj kelkaj tagoj ĉe la maro ni laboris la tutan jaron. Tio estis nia tempo. Mi treege miris kiom multajn aferojn ni ne vidis en nia loĝloko laŭ la vojo al kaj de la laboro. Pasis unu Krisnasko, poste la alia. Ni komencis observi kreskantan inflacion, diversajn indicojn. Mi atendis avancon en mia firmao. Vi diris, ke mi devas pripensi, ĉu mia pli alta salajro meritas aldonan kroman laborkvanton. Mi certis, ke vi estas trosentema je ĉi tiu punkto ĉar vi ankaŭ havis kromhorojn. Mi ne scias, kiu el ni pravis.

Vi sidis sur sablo, ekster la plejdo, eble pro la hieraŭa vespero. Eble mi drinkis tro, eble tro multe mi malsekretigis. Sed vi devis scii, ke mi normale ne estas tia kaj pro tio mi ne pardonpetis vin pli frue. Sed hodiaŭ vi estis surda je ĉiuj miaj promesoj pri mia pliboniĝo. Vi ankaŭ ne reagis je tiklado. Ĉi tiu sunsubiro estis la lasta sunsubiro antaŭ nia reveno hejmen. La vidindaĵo ĉiam ĝojigis min, vin – verŝajne ankaŭ.

– Ne koncentriĝu tiel je la propraj pensoj – mi diris ne tro saĝe, kiam vi rigardis silente en la linion de la horizonto.

Vi ne reagis kaj tio min kolerigis eĉ pli. Ni interparolu, ni interkomuniku! – mi volis krei rekte en vian vizaĝon, sed mi sciis, ke tio nur malbonigus la situacion. Mi ŝatus aŭdi pri via fascino, ke ĉi tie estas tiel

bele, ke estas freŝa aero, ke vi estas feliĉa en la loko, kie ni estas. Ni ne povis plendi je manĝaĵoj en la hotelo, en ĝi estis vifio, ni kolektis multajn ŝtonetojn kaj konketojn por donaci ilin al ĉiuj niaj amikoj. Niaj sekvaj komunaj eksterlandaj ferioj.

Eble vi ŝatis spiti min? Jes, vi venkis, mi povas aĉeti florojn por vi, porti vin sur mia dorso al la hotelo, fari ion ajn. Nur rigardu min – vokis mia korpo. Mi pinĉis vin tiel, kiel vi ne ŝatas, por ke vi saltu supren kaj iomete iritita avertu min kaj eduku por min korekti.

– Mi estas graveda – vi diris.

Mi perdis la voĉon – mi, kiu respondecis pri kontaktoj kun klientoj, pri nombrado de profitoj, se ili uzos nian oferton. Mi ne supozis, mi nur pinĉis vian haŭton kaj vi, kiel kutime, devis min mallaŭdi.

– Ni havos infanon – vi komencis plori.

Vi ne vidis ĝojon sur mia vizaĝo. Mi estis surprizita. Kompreneble, mi pensis pri infanoj, pri infanoj kun vi, sed ne nun, ne ĉi-jare, ne kun ĉi tiu salajro kaj partopago de nia kredito. Ni devos ŝanĝi multajn aĵojn, kaŝi en nia loĝejo objektojn, kiujn oni povas facile engluti. Kaj probable mi devos ĉesi fumi, ĉar ŝajne tio damaĝas sanon – ne la mian, sed de la infano. Jes, finfine mi alŝraŭbos la klinkon al la kuireja ŝranketo, supre je maldekstra flanko. Kaj mi pensos, ke mi devos pli frue reveni hejmen...

Larmoj daŭre fluis sur viaj vangoj. Ne estis tiel, ke vi ne volis ĉi tion. Sed ŝajne nun vi timis ion plani. Mi ne povis vin tiel lasi, diri, ke mi iros naĝi kaj ne elnaĝi en la sama loko.

Mi ŝatus, se vi ne plu plorus.

El la pola tradukis Nina Pietuchowska

BARTOSZ DŁUBAŁA

Szczęście

Do hotelu mieliśmy dziesięć minut drogi, może jedenaście i pół, patrząc na zegarek. Słońce chyliło się już ku zachodowi, lecz nie chciałem jeszcze wracać. Lubiłem te nasze popołudnia na plaży, u nas nie było tego szumu fal. Chyba właśnie dla tych kilku dni pracowaliśmy cały rok. To był nasz czas. Nie mogłem się nadziwić, jak wielu rzeczy nie widzieliśmy na miejscu, w drodze z pracy do mieszkania. Przeszły jedno, drugie święta, zaczęliśmy śledzić rosnącą inflację, te wszystkie wskaźniki. W powietrzu wisiał mój awans w firmie, powiedziałaś, żebym jednak zastanowił się, czy wynagrodzenie jest warte ponoszonych kosztów. Byłem pewien, że jesteś przewrażliwiona na tym punkcie, też brałaś nadgodziny. Nie wiem, które z nas miało rację.

Siedziałaś na piasku, poza kocem, pewnie z powodu wczorajszego wieczoru. Może za dużo się chlapanęło, wylało ze mnie na wierzch, ale musiałaś wiedzieć, że ja taki na co dzień nie jestem, dlatego nie przeproszałem wcześniej. A dzisiaj byłaś głucha na wszelkie obietnice poprawy, nie miałaś łaskotek. Ten zachód słońca nad morzem miał być naszym ostatnim przed powrotem. Ten widok sprawiał mi radość, tobie chyba też.

– Już tak nie odpływaj – rzuciłem głupkowato, gdy wpatrywałaś się w milczeniu w linię horyzontu.

Nie zareagowałaś, co mnie jeszcze bardziej rozeźliło. Rozmawiajmy, komunikujmy się! – chciałem ci wykrzyzczeć w twarz, ale wiedziałem, że to tylko pogorszy sytuację. Chciałem usłyszeć od ciebie zachwyty, że bardzo

tu pięknie, że świeże powietrze, że jesteś szczęśliwa w tym miejscu, w którym jesteśmy. Nie mogliśmy narzekać na jedzenie, w hotelu było wifii, a kamyków i muszelek nabieraliśmy tyle, że mogliśmy nimi obdarować wszystkich znajomych. Nasze kolejne wspólne zagraniczne wakacje.

Może chciałaś się ze mną droczyć? Tak, wygrałaś, mogę kupić ci kwiaty, przenieść cię na plecach do hotelu, cokolwiek. Spójrz tylko na mnie – wołało moje ciało. Uszczypnąłem cię, tak jak nie lubisz, żebyś podskoczyła i w końcu, z lekka poirytowana, dała mi nauczkę, wychowywała na kogoś innego.

– Jestem w ciąży – powiedziałaś.

Straciłem głos – ja, ten, który odpowiedzialny był za kontakt z klientem i wyliczanie korzyści płynących ze skorzystania z oferty. Nie spodziewałem się, ja tylko szczypałem twoją skórę, miałaś mnie zganić jak zwykle.

– Będziemy mieli dziecko – zaczęłaś płakać.

Nie widziałaś, żebyśmy cieszył się. Byłem zaskoczony. Owszem, myślałem o dzieciach, o dzieciach z tobą, ale nie teraz, nie w tym roku, nie przy takiej pensji i racie kredytu. Będziemy musieli wiele rzeczy zmienić, pochować w mieszkaniu przedmioty, które da się łatwo połączyć. I chyba będę musiał przestać palić, to podobno szkodzi zdrowiu – nie żeby mojemu, to już było skazane przez lata wykonywanego wyroku, ale dziecka. Tak, w końcu przykręcę klamkę od tej szafki w kuchni, u góry po lewej stronie. I pomyślę, żeby trochę wcześniej wracać do domu...

Łzy nadal płynęły po twoich policzkach. To nie tak, że tego nie chciałaś, ale chyba teraz bałaś się cokolwiek planować. Nie mogłem cię tak zostawić, powiedzieć, że idę popływać i nie wypłynąć w tym samym miejscu.

– Chcę, żebyś przestała płakać.

ANNA JÓŴWICKA

Bilancio de la vivo

La kapon de Helena absorbis maltrankvilaj pensoj. Neeviteble proksimiĝis ŝia centa naskiĝdatreveno. Sabate ŝi devos fari paroladeton por gastoj kolektiĝintaj por ŝia naskiĝdatrevena festeno. Ĉu ŝi sukcesos? Verkado ĉiam estis por ŝi agrablaĵo. Por tio ŝi vivis. Malgraŭ ĉio la proksimiĝanta solenaĵo ne etosis ĝin pozitive. Ĝi kreis ian enan streĉon. „Kiel resumi sian vivon? Kiel ĝin sumigi? Kaj ĉu tio jam estas ĉio?“ – ŝi pensis malrapide balanciĝante en sia plej ŝatata fotelo. Ŝi aĉetis ĝin tuj post la nasko de Tadeo. Ŝi sidis en ĝi dum multaj horoj kun la amata infano ĉe la brusto.

Ŝi ordigis la plejdon deŝoviĝantan de la genuoj. Ĝi estis mola kiel veluro. Helena ŝatis ĝian tuŝon sur sia haŭto. Ŝi ankaŭ ŝategis verdan koloron. Ĝi signifis por ŝi esperon, printempon kaj novan vivon. Revenis al ŝi bildo de antaŭ multaj jaroj... ili promenis en la parko Planty. Ĉirkaŭ ili gaje kantis birdoj, ŝi, enamiĝinta ĝis la oreloj en Johanon, rigardis liajn blujajn okulojn. La naturo vekigis por vivo, ĉio ĉirkaŭe verdiĝis. Parkaj fontanoj ŝprucis supren akvostriojn, ŝajnis, ke ili strebis kapti la ritmon de la du enamiĝintaj koroj.

Certe, en la vivo okazis ne nur rozkoloraj momentoj. La bilanco de ĝi ŝajnis esti plusa. Finfine ŝi sidis sur la teraso de la domo, en kiu ŝi travivis signifan parton de sia vivo. La domo ĉiam estis por ŝi azilo de trankvilo kaj feliĉo. Supervalora estis la ĝardeno, kiu ĝin ĉirkaŭis. Ŝi ĉiam amis la naturon, kiu donacis al ŝi forton, trankvilon kaj kvieton, kiujn ŝi

ofte bezonis. Ĉu ŝi estis feliĉa? Jes. Ĉi tie – ĉiam. Helena por momento duonfermis la okulojn, lacigita pro la bilanco de sia vivo. Ŝi ŝatus iomete ripozi, ĉar ŝi devis daŭre prepari la poroladeton.

– Panjo, jam estas la tempo por vespermanĝi – vokis ŝin el la dom-interno Krystyna, ŝia plej juna filino. – Panjo, venu, aŭ via la plej ŝatata framba teo malvarmiĝos.

Vidante, ke la panjo ne reagis, Krystyna delikate metis sian manon sur ŝian ŝultron. Tamen Helena ne moviĝis eĉ pormomente. Ŝi endormiĝis pensante pri ĉio, kio igis ŝin en la vivo feliĉa.

El la pola tradukis Nina Pietuchowska

ANNA JÓZWICKA

Bilans życia

Głowę Heleny zaprzętały niepokojące myśli. Nieuchronnie zbliżały się jej setne urodziny. W sobotę będzie musiała wygłosić małe przemówienie do gości zebranych na jej przyjęciu urodzinowym. Czy sobie poradzi? Pisanie zawsze sprawiało jej przyjemność. Po to żyła. Mimo wszystko nadchodząca okoliczność nie nastrajała jej pozytywnie. Budziła jakieś wewnętrzne napięcie. „Jak streścić swoje życie? Jak je podsumować? I czy to już wszystko?” – pomyślała bujając się powoli w ulubionym fotelu. Kupiła go zaraz po urodzeniu Tadeusza. Siedziała w nim wówczas godzinami tuląc do piersi ukochane dziecko.

Poprawiła zsuwający się z kolan zielony koc. Był miękki jak aksamit. Helena uwielbiała jego dotyk na swojej skórze. Podobnie zresztą jak uwielbiała kolor zielony. Oznaczał dla niej nadzieję, wiosnę i nowe życie. Powrócił do niej obraz sprzed lat... szli alejką w Parku Planty. Wokół radośnie śpiewały ptaki, a ona po uszy zakochana w Janie spoglądała w jego błękitne oczy. Natura wówczas budziła się do życia przybierając barwę soczystej zieleni. Fontanny wystrzeliwały do góry strumienie wody, jakby chciały złapać rytm ich szybko bijących serc.

Owszem, w życiu zdarzały się nie tylko różowe chwile. Bilans wydawał się jednak być na plusie. Koniec końców, siedziała na tarasie domu, w którym przeżyła znaczną część swojego życia. Dom zawsze był dla niej ostoją spokoju i szczęścia. Nieocenioną rolę pełnił otaczający go ogród. Zawsze kochała naturę, bo ta dawała jej siłę, ukojenie i wyciszenie,

którego często tak bardzo potrzebowała. Czy była szczęśliwa? Tak. Tutaj zawsze. Helena na chwilę przymknęła oczy, zmęczona bilansem swojego życia. Chciała odpocząć tylko troszeczkę, przecież musiała dalej przygotowywać przemówienie.

– Mamo, już czas na kolację – zawołała z wnętrza domu Krystyna, najmłodsza córka. – Mamo, chodź. Wystygnie twoja ulubiona malinowa herbata.

Widząc brak reakcji matki, Krystyna delikatnie położyła rękę na jej ramieniu. Helena nie poruszyła się jednak ani na chwilę. Usnęła rozmyślając o wszystkim, co czyniło ją w życiu szczęśliwym.

ANDRZEJ LICZMONIK

Demando

La junulo ekstaris antaŭ la enirejo al la domo de la Saĝulo kaj eksentis timon. Ne tro ofte li povis renkonti homojn tiom grandajn. Li faris longan vojaĝon por interparoli kun la Saĝulo. Li multege pagis por veni ĉi tien kaj nun, kiam la celo de la vojaĝo estis tuj antaŭ li, kaptis lin duboj. Li sentis respekton antaŭ sia interparolonto, devis superi sian naturan timemon por finfine frapi la pezan lignan pordon ornamitan per skulptitaj kapoj de leonoj, drakoj kaj aliaj monstroj, kiujn la junulo eĉ ne scipovus nomi.

La pordon malfermis maljunulo, iom kurbiĝinta, kun forte faltiĝinta vizaĝo, povre vestita. Lia vestaĵo havis signojn de multaj riparoj faritaj per ne tro lerta mano uzanta fadenon en malĝusta koloro. Lia hararo estis tondita proksime al la haŭto kaj arĝentblanka barbo, longa ĝis la talio, balanciĝis majeste.

La maljunulo ridetis afable kaj per bonvola gesto invitis la junulon internen.

La domo konsistis el du ejoj. La unua estis mallarĝa vestiblo kun multaj hokoj enigitaj en lignajn vandojn. Sur ili troviĝis faskoj de sekigitaj herboj kaj diversaj iloj bezonataj por laboro en la domo kaj la ĉirkaŭaĵo. Per malalta pordo, ne tiom ornamita kiom la antaŭa, oni eniradis vastan ĉambbron, kiu estis samtempe manĝejo, dormejo, banĉambro, kuirejo kaj laborejo de la maljunulo. Distingiĝis du bretaroj, faritaj el dikaj, kverkaj tabuloj. Unu estis plenigita per vitraj ujoj kun diverskoloraj fluidaĵoj,

la dua – per dikegaj libroj kun nigraj dorsoj ornamitaj per orbrilaj literoj. La surskriboj estis en lingvo, kiun la junulo ne konis.

La maljunulo montris al la gasto seĝon ĉe granda, kvadrata tablo staranta meze de la ĉambro, kaj demandis, ĉu li volas trinki ion. La junulo pasigis multajn tagojn vagante dum sunvarmego per vojoj, ĉe kiuj malofte oni povis trovi gastejon. Tial kun ĝojo li akceptis la proponon. Kiam antaŭ li aperis kruĉo kun vino maldensigita per akvo, li komencis trinki avide, ne pensante, ke tio povas kaŭzi malbonan opinion pri lia ĝentileco. Kaj ja li tre volis fari bonan impreson je la mastro de la domo.

La maljunulo ne montris ian ajn miron. Li atendis ĝis la junulo satigis la soifon kaj demandis:

– Kio venigas vin al mi, junulo? Pri kio mi povas helpi al vi? Mi devas konfesi, ke de longa tempo neniun venis al mi por peti konsilon. La mondo tre ŝanĝiĝis en la lastaj jaroj. La homoj estas konvinkitaj, ke mem ĉion scias plej bone, ke la fakto ricevi ŝtatan dokumenton konfirmantan la maturecon, faras ilin saĝuloj en ĉiu kampo de la vivo. Ili ne volas uzi la sperton de la pli aĝaj. Des pli ĝojigas min, ke homo en via aĝo faris tiom longan vojaĝon por aŭskulti min. Do, mi atendas. Kio venigas vin al mi? Diru kuraĝe.

La junulo eksentis sin pli libere. La eltrinkita vino kaj la gastemo montrita de la Saĝulo kaŭzis, ke la timo, kiu paralizis lin, kiam li staris ekstere, tute malaperis.

– Mi aŭdis multe pri via saĝeco – komencis li trankvile. – Mi venis ĉi tien de malproksime por ekscii ĉe la sojlo de mia matura vivo, kio helpas al mi atingi la feliĉon. Pri kio koncentriĝi por esti feliĉa?

La Saĝulo dum momento rigardis en la okulojn de la junulo kaj silente glatigis sian longan, blankan barbon. Finfine li ekparolis.

– Kelkaj opinias – li komencis – ke sur la vojo al la feliĉo plej grava estas pligrandigado de sia riĉaĵo. Kiam ili vidas, ke ĉiun jaron ĝi pligrandiĝas, ili sentas sin feliĉaj. Aliaj opinias, ke la plej grava fonto de la feliĉo estas la eblo havi ordonpovon. Kiam ili staras solaj antaŭ la amaso de la aliaj, pli fortaj ol ili kaj krome armitaj homoj, kaj ili povas fari la ordonojn:

„falu”, „stariĝu”, kaj ili vidas ke la ordonoj estas plenumataj, ili sentas veran, ne repreneblan ĝuegon. Estas ankaŭ tiuj, al kiuj la pinto de la feliĉo estas havi kiom eble plej longe bonan sanon. Ili plej ofte venas al mi por ricevi herbojn aŭ diversajn infuzaĵojn. Tamen havante bonan sanon ili ne sentas ĝojon, la tutan tempon ili ĉagreniĝas por ne perdi ĝin. Ili estas feliĉaj nur tiam, kiam ili resaniĝas post vere grava malsano. La alia grupo estas tiuj, kiuj pensas, ke la ĉefa kaŭzo de la feliĉo estas la propra beleco. Rigardante sin en spegulo ili sentas sin plej bone. Sed kutime venas la malfeliĉo kiam ili fariĝas maljunaj, kiel mi. Por kelkaj la plej granda feliĉo estas enamiĝi kun reciproko kaj subteni la amon dum longa tempo. Estas ankaŭ homoj, por kiuj la feliĉo estas ĉiam plilarĝigi sian scion, kelkaj ankaŭ...

– Momenton – la junulo interrompis al la Saĝulo – la tutan tempon vi rakontas, kio estas la feliĉo laŭ la aliaj. Mi ne venis al vi por ekscii, kion opinias diversaj homoj. Mi volas, ke vi diru al mi, kio VERE estas la fonto de la feliĉo. Diru al mi, kia estas la VERO. Mi petas, ja vi estas la Saĝulo.

La maljunulo enpeniĝis. Denove li komencis glatigi la barbon. Tamen nun li ne rigardis la okulojn de la junulo. Por momento li konsterniĝis, tamen baldaŭ li reakiris sian memkonfidon kaj diris al la junulo:

– Mi portas ŝuojn numero kvardek tri. Ĉu tio signifas, ke ŝuo de tiu numero estas VERE oportuna por ĉiuj? Ĉu vi sentus vin komferte surmetante miajn ŝuojn?

– Mi pensas, ke ne – respondis la junulo – sed kiel tio ligiĝas kun mia demando?

– Tre forte. Same kiel ŝuo devas esti ĝusta por ĉiu piedo, tiel la respondo al la demando pri la feliĉo ne povas esti unu, la sama, universala por ĉiuj. Por mi la feliĉo estas kolektado de ĉiam pli novaj spertoj kaj la eblo kunhavigi ilin kun aliaj homoj. Ĉu vi povus proponi tiun recepton por la feliĉo al iu, kiu kun peno ellernis legi kaj skribi? Aŭ eble tute ne sukcesis tion?

– Nu, verŝajne ne.

– Ĉu tia homo ne rajtas esti feliĉa, ĉar li ne scipovas atingi tion, kio feliĉigas min?

– Certe li rajtas.

– Do li devas trovi al si alian fonton de la feliĉo. Tiun, kiun li scipovos atingi. Ĉiu laŭ sia mezuro, laŭ siaj sentoj. Mi povas sugesti al vi nur tion – ne trovos la feliĉon tiu, kiu serĉas ĝin ne tie, kien turnas sin lia koro; tiu, kiu ekkredis, ke la feliĉo estas tio aŭ io alia, kaj ne ekkonis sian internon. Tial la demandon, kiun vi starigis al mi, turnu komence al vi mem. Kiam vi ekscios, kion vi deziras, vi eksentos, kie serĉi la feliĉon. Tiam ĝi estos la via. Alian respondon ne atendu de mi. Mi ne povus nomiĝi la Saĝulo, se mi dirus al vi pli multe. Restu sana! Mi deziras al vi sukcesan serĉadon. Verŝajne mi ne ĝisvivos la tagon, kiam vi povos diri: mi trovis mian vojon al la feliĉo. Tamen ja ĝia malkovro jam feliĉigos vin. Pri tio mi estas certa.

La junulo kliniĝis malalte al la Saĝulo, kaj dankinte por la konsilo li ekiris la revenan vojon al la hejmo. Ĝi ŝajnis multe pli peza ol la vojo ĉi tien. La tasko donita de la maljunulo ĉagrenis lin forte. „Ĉu mi sukcesos kompreni min kaj malkovri, kiaj estas vere miaj deziroj?” li pensis. „Eble pli bone estos post la reveno hejmen iri dormi kaj la feliĉo iel venos al mi? Tamen tiukaze mia longa vagado montriĝus senseca”.

El la pola tradukis Grażyna Barszczewska-Banel

ANDRZEJ LICZMONIK

Pytanie

Młodzieniec stanął przed wejściem do domu Mędrca i poczuł, że ogarnia go strach. Nie każdego dnia dane mu było spotykać ludzi takiego formatu. Odbył daleką podróż, żeby porozmawiać z tym człowiekiem. Wykosztował się przy tym niesamowicie, a teraz, kiedy cel miał dosłownie na wyciągnięcie ręki, ogarnęły go wątpliwości. Czuł respekt przed swoim przyszłym rozmówcą i musiał przemóc naturalną nieśmiałość, żeby w końcu zapukać do ciężkich, drewnianych drzwi, na których wyrzeźbione były głowy lwów, smoków i innych potworów, których młodzieniec nie potrafił nawet nazwać.

Otworzył mu starszy człowiek, nieco przygarbiony, o twarzy pooranej zmarszczkami, ubrany raczej ubogo. Jego szata nosiła ślady licznych krawieckich interwencji dokonywanych amatorsko, mało wprawną ręką przy użyciu nici nie zawsze kolorystycznie dopasowanych do całości. Głowę miał ostrzyżoną niemal przy skórze, natomiast u dołu jego twarzy majestatycznie kołysała się długa, srebrzystobiała broda sięgająca do połowy torsu.

Starzec uśmiechnął się dobrotliwie i życzliwym gestem zaprosił młodzieńca do środka.

Jego dom składał się z dwóch pomieszczeń. Jednym z nich była wąska sień, w której na licznych hakach wbitych w drewniane ściany wisały wiązanki suszonych ziół oraz rozmaite narzędzia przydatne do pracy w domu i wokół niego. Przez niskie drzwi, nie tak ozdobne, jak te główne, wchodziło się do obszernej izby pełniacej jednocześnie funkcję

jadalni, sypialni, łazienki, kuchni oraz miejsca pracy starego człowieka. Szczególnie wyróżniały się w niej stojące naprzeciwko drzwi wejściowych dwa regały zbite z grubych, dębowych desek. Jeden był zastawiony szklanymi naczyniami wypełnionymi płynami o różnych barwach, drugi zaś opasłymi księgami o czarnych grzbietach ozdobionych złotymi literami. Napisy były w języku, którego młodzieniec nie znał.

Mędrzec wskazał mu krzesło przy dużym, kwadratowym stole stojącym pośrodku izby i zapytał, czy zechciałby się czegoś napić. Młodzieniec miał za sobą wiele dni spędzonych na wędrowaniu w skwarze słońca, po drogach, przy których niezbyt często spotkać można było gospodę. Przyjął propozycję z radością. Gdy stanął przed nim dzban wina rozcieńczonego wodą, zaczął łapczywie pić, nie zważając na to, że takie zachowanie może zostać odebrane jako źle świadczące o jego manierach. A przecież zależało mu, żeby zrobić dobre wrażenie na gospodarzu tego domu.

Starszy człowiek nie okazał jednak najmniejszego nawet zgorznienia. Zaczekał, aż młodzieniec zaspokoi pragnienie, a następnie zapytał:

– Co cię do mnie sprowadza, młody człowieku? W czym mogę okazać się tobie pomocny? Przyznam szczerze, że już dawno nikt nie przychodził prosić mnie o radę. Świat w ostatnich latach bardzo się zmienił. Ludzie nabrali przekonania, że sami wiedzą wszystko najlepiej, że fakt otrzymania państwowego dokumentu potwierdzającego dorosłość czyni ich mądrymi w każdym aspekcie życia. Nie chcą korzystać z doświadczenia starszych od siebie. Tym bardziej cieszy mnie, że człowiek w twoim wieku pofatygował się taki kawał drogi, żeby posłuchać, co mam do powiedzenia. No więc słucham. Co cię tu sprowadza? Mów śmiało.

Młodzieniec poczuł się swobodniej. Wypite wino oraz gościnność okazana przez Mędrca sprawiły, że cała trema, która paraliżowała go, kiedy stał na zewnątrz, ulotniła się zupełnie.

– Słyszałem wiele o twojej mądrości – zaczął spokojnie. – Przyszedłem tu z bardzo daleka, żeby na progu swojego dorosłego życia dowiedzieć się, co pomoże mi osiągnąć szczęście. Na czym przede wszystkim mam się skupić, żeby być szczęśliwym?

Mędrzec patrzył przez chwilę młodzieńcowi w oczy i w milczeniu gładził swoją długą, białą brodę. W końcu odezwał się.

– Jedni uważają – zaczął swój wywód – że najważniejsze w drodze do szczęścia jest stałe pomnażanie swojego majątku. Kiedy widzą, jak każdego roku przybywa go więcej niż w roku poprzednim, czują się szczęśliwi. Inni znów są zdania, że najważniejszym źródłem szczęścia jest możliwość sprawowania władzy. Stając w pojedynkę przed gromadą silniejszych od siebie i do tego uzbrojonych ludzi, wydając im komendy: „padnij”, „powstań”, i widząc, że są one wykonywane, czują prawdziwą rozkosz, której sam diabeł im później nie odbierze. Są też tacy, dla których szczytem szczęścia jest zachować jak najdłużej dobre zdrowie. Oni najczęściej przychodzą do mnie po zioła i różne nalewki. Kłopot w tym, że mając zdrowie nie odczuwają radości, ale martwią się cały czas o to, żeby go nie stracić. Szczęśliwi są tylko wtedy, gdy wyzdrowieją po jakiejś naprawdę ciężkiej chorobie. Jeszcze inni upatrują szczęścia we własnej urodzie. Szczyt ekstazy osiągają przeglądając się w lustrze. No cóż, zwykle pogrążają się w smutku, kiedy dożywają wieku takiego, jak mój. Dla niektórych najwyższym szczęściem jest zakochać się z wzajemnością i utrzymać tę miłość przez długi czas. Są także ludzie, którzy szczęścia upatrują w ciągłym poszerzaniu wiedzy, niektórzy również...

– Chwileczkę – przerwał Mędrceowi młodzieniec. – Cały czas mówisz o tym, co inni uważają za szczęście. Jedni to, drudzy tamto. Nie po to przebyłem taki szmat drogi, żeby dowiedzieć się, co różni ludzie myślą. Chcę, żebyś powiedział mi, co NAPRAWDĘ jest źródłem szczęścia. Powiedz mi, jaka jest PRAWDA w tym względzie. Proszę cię. Jesteś przecież Mędrce.

Starszy człowiek zasępił się. Ponownie zaczął gładzić swoją brodę. Tym razem jednak nie patrzył w oczy swojemu rozmówcy. Był wyraźnie zbity z tropu. Po chwili jednak odzyskał pewność siebie i sam zadał młodzieńcowi pytanie.

– Ja noszę buty rozmiar czterdzieści trzy. Czy to znaczy, że but o takim rozmiarze jest NAPRAWDĘ wygodny dla wszystkich? Czy ty czułbyś się dobrze założywszy moje buty?

– Wydaje mi się, że nie – odparł młodzieniec – ale co to ma wspólnego z moim pytaniem?

– Bardzo wiele. Widzisz, tak jak but musi być dopasowany do nogi, tak i odpowiedź na pytanie o szczęście nie może być jedna, uniwersalna, taka sama dla wszystkich. Dla mnie szczęściem jest gromadzenie coraz to nowych doświadczeń i możliwość dzielenia się nimi z innymi ludźmi. Czy zaproponujesz taką receptę na szczęście komuś, kto z trudem nauczył się czytać i pisać? Albo w ogóle się nie nauczył?

– No, chyba nie.

– Czy taki człowiek nie ma prawa do szczęścia, bo nie może osiągnąć tego, co mnie uszczęśliwia?

– Zapewne ma.

– Więc on powinien znaleźć sobie inne źródło szczęścia. Takie, które będzie zdolny osiągnąć. Każdy na swoją miarę, każdy zgodnie z własnymi odczuciami. Mogę podpowiedzieć ci tylko jedno. Nie znajdzie szczęścia ten, kto szuka go tam, gdzie nie podąża jego serce. Kto dał sobie wmówić, że szczęściem jest to lub tamto, a swojego wnętrza nie rozeznał. Dlatego pytanie, które mi postawiłeś, powinieneś zadać najpierw samemu sobie. Jeśli dowiesz się, czego pragniesz, będziesz wiedział, gdzie szukać szczęścia. Wtedy z pewnością będzie ono twoim udziałem. Innej odpowiedzi ode mnie nie oczekuj. Nie byłbym wart miana mędrca, gdybym powiedział ci coś więcej. Bywaj zdrow. Życzę ci owocnych poszukiwań. Pewnie nie dożyję dnia, kiedy będziesz mógł powiedzieć: znalazłem własną drogę do szczęścia. Ale już samo jej odkrycie będzie dla ciebie wielce uszczęśliwiające. O tym mogę cię zapewnić.

Młodzieniec pokłonił się nisko Mędrcowi i, podziękowawszy za radę, wyruszył w drogę powrotną do swego domu. Szło mu się o wiele trudniej niż w tę stronę. Przygniatała go perspektywa zadania, jakie wyznaczył mu starzec. „Czy w ogóle dam radę tak przeniknąć siebie, żeby odkryć swoje prawdziwe pragnienia?“, rozmyślał. „Może lepiej po powrocie do domu położyć się spać, a szczęście samo jakoś wpadnie w ręce. Tylko po co było aż tyle wędrować, żeby to stwierdzić?“

*Distingo en la literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn. Kio estas feliĉo por mi?”*

JORGE RAFAEL NOGUERAS

Eĉjo, mia feliĉo

Mia filo Eĉjo estas la plej granda ĝojo, kiun ajna patrino povus deziri. Li estas inteligenta, amema, kaj ankaŭ – kial modesti? – tre ege ĉarma. Ĉiam, kiam li alvenas de la gimnazio, li salutas min per kiseteto kaj per dolĉa „Saluton, Panjo!”, kaj tuj supreniras al sia ĉambro por fari siajn hejmtaskojn. Li havas antaŭ si brilan estonton, kaj mi estas fierega esti lia patrino. Li certe iam feliĉigos iun knabinon (aŭ knabon, tio neniel zorgigus min!) kiam li edziĝos, plenkreskinte.

Mi nomis lin „Estunto” ĉar li estas la filo, kiun mi estis havonta kiam mi gravediĝis antaŭ dek kvin jaroj, sed ne sukcese naskis. Kiu povus kulpigi min, se mi elektis bildigi al mi la feliĉon, kiun li estus sendube doninta al mi?

JORGE RAFAEL NOGUERAS

Eĉjo, moje szczęście

Mój syn Eĉjo jest największą radością, jakiej może pragnąć którakolwiek matka. Jest on inteligentny, kochający i jeszcze – dlaczego być skromnym? – przeuroczy. Zawsze, kiedy wraca z gimnazjum, wita mnie całuskiem oraz słodkim „Witaj, Mamol!” i natychmiast idzie na górę odrobić pracę domową. Ma on przed sobą świetlaną przyszłość i jestem dumna z bycia jego matką. Na pewno kiedyś uszczęśliwi jakąś dziewczynę (lub chłopca, to by mnie nie martwiło!), kiedy będąc dorosłym ożeni się.

Nazwałam go „Estunto”, gdyż jest on synem, którego miałam mieć, kiedy byłam w ciąży przed dwudziestu pięciu laty, lecz którego nie dane mi było urodzić. Któż mógłby mnie obwinić za to, że postanowiłam wyobrazić sobie szczęście, które by mi on niewątpliwie dał?

Z esperanta tłumaczyła Maria Niemyjska

ZDRAVKO SELEŠ

Feliĉo de esperanta fanatikulo

Estas somero 2022. Liberigita de gelernatoj kaj gimnaziaj devigoj, mi trovis tempon por trarigardi fotojn el lastjara ĉasaĵo. Unu el la lastaj mapoj devenas el la decembro de 2021. En ĝi mi trarigardas scenojn el Bjalistoko, kien min veturigis la Erasmus-projekto „Reta edukado nun“, kaj kie okazis renkontiĝo de tri Erasmus-projektoj dum la 22-aj Bjalistokaj Zamenhofaj-Tagoj. En la plej gravaj el la fotoj (normale, por mi, ne grand-historie!) videblas mia amiko Joĉjo kaj mi ĉe la plej gravaj ZEOj en la tuta mondo. Tagoj estis tipaj decembraj: nubaj kaj malvarmaj, kaj ni estas varme vestitaj – mi eĉ kun la ĉapo sur la kapo. Sed la vetero ne tuŝis nian animstaton; ja mi pli kaj pli forte rememoras kiel ni (almenaŭ mi) sentis. Kiel knaboj al kiuj efektiviĝis la sonĝo! Ĉar, jes, ni estis knaboj antaŭ pli ol 45 jaroj kiam mi ĉe Joĉjo komencis lerni Esperanton kaj kiam, jaron aŭ du poste, ni en Ĝurĝevac fondis la Esperanto-klubon Bjalistok. Nun eĉ al mi sonas stulte: anstataŭ klubo Ĝurĝevac en Ĝurĝevac, ni prenis kiel la nomon foran lokon de Zamenhofa naskiĝo! Ĉar jam tiam Bjalistoko estis nia Esperanta Mekko, Romo aŭ Jerusalemo!

Kaj jen; mi rememoris kiel aspektis nia fotado en la iama strato Zielona (La verda, interese!), kie iam staris la naskiĝdomo de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ni interfrotadis kiel iaj elementlernejoj aŭ iaj stult-etaĵ junulinoj – nur ni ne faris memfotojn, sed fotis unu la alian provante el la diversaj direktoj ĉasi kiel eble pli bonan foton antaŭ murpentraĵo kun Nia Majstro sur balkono de dua etaĝo. Nun al mi ŝajnas ke li rigardis

ien foren, iomete hontinte pro neseriozeco de homoj en la seriozaj ĉirkaŭ sesdekaj jaroj! Nun en mia memoro aperas sceno de la homo kiu preterpasis en aŭtomobilo kaj vidis nian fotumadon. Mi tiam ekpensis ke mi preskaŭ scias kion li pensas: „Jen denove tiuj verdaj fanatikuloj! Kiu scias de kie ili venis adori lokon kie iam estis la domo de tiu fantaziulo Zamenhof, kaj nun estas nur tiu tabulo kaj tiu stulta murpentraĵo! Kaj ili eĉ ne vidas ke tie trairas aŭtomobilo!“. Se kun li estus edzino, verŝajne li tion eĉ dirus al ŝi kaj ili ironie ridus!

Kaj mi ekpensis ke mi ne estas ia ajn verda fanatikulo (pri Joĉjo oni ne povus diri tion, ja li en la korto de sia domo konstruis ankoraŭ unu domon kie situas Dokumenta Esperanto-Centro!). Mi eĉ de tempo al tempo preskaŭ kabeiĝadis; ekzistis jaroj kiam mi ne okupiĝis pri Esperanto, kvankam dum mia junaĝo mi sufiĉe vojaĝis, ĉeestis du TEJO-kongresojn kaj movadumis multmaniere. Eĉ la fasado de mia domo estas, vi povas imagi – verda! (Sed, por pravigo, mi diru ke mi ankaŭ estas ekologio!). Kaj mi prifajfis la rigardon de la trairinta ŝoforo: mi ne permesos al iu cinikulo ke li fuŝu miajn feliĉajn momentojn – ja post preskaŭ tuta aktiva vivo mi finfine atingis revitan Bjalistokon – la urbon meritan ĉar en ĝi naskiĝis unu el miaj plej grandaj sanktuloj (miaj „sanktuloj” estas pli civilaj ol religiaj, kiel Erasmo de Roterdamo kaj Ghandi) kaj la urbon kies pekoj de netoleremo naskis en la menso de knabo Zamenhof ideon pri la komuna, internacia lingvo de la homaro, kiu helpas al interkompreniĝo. Antaŭ pli ol dudek jaroj mi verkis postparolon por la esperanta eldono de la kroata porinfana romano „La kamaradaro de Petro Nodeto” de Mato Lovrak, kie mi asertis ke la mondon ŝanĝas kaj plibeligas la homoj kiuj ne rezignis pri propraj infanaj revoj, do, ni diru, la homoj kiuj ne perfdis sin mem. Kaj se mi estis feliĉa kiel knabo denove tralegante la romanon kiu en mi vekis iaman knabon, kial mi ne estu feliĉa pleniginte mian knaban sonĝon pri pilgrimo al Bjalistoko? Kiu min povas haltigi ke mi infaniĝu kaj ridetu de unu orelo ĝis la alia? Mi eĉ volis al tiu ŝoforo doni lecionon – li devus fieri ĉar vivas en la urbo de Zamenhof kaj ellerni Esperanton! Mi muntas en mia cerbo novan filmon: en ĝi sinjoro ŝoforo haltigas la

aŭtomobilon, eliras kaj klare salutas nin: „Karaj sinjoroj, bonvenon en urbon de Zamenhof! Ĉu vi venis la unuan fojon? Jen, donu al mi fotilon por ke mi fotu vin du kune...”.

Kaj Joĉjo kaj mi promenadis tra Bjalistoko, vizitadis ZEOjn, ĝuis en la renkontiĝoj kaj novaj konatiĝoj, en la kulturaj programoj – koncertoj, prelegoj, prezentado de nova Bjalistoka Kajero, ekspozicioj en la Centro Ludoviko Zamenhof... Ni vere estis knaboj al kiuj plenumiĝis la sonĝo, kaj ne iaj verdaj fanatikuloj! Kaj dum mi rememoris ĉion tion rigardante la fotojn, mi unue pripensis ke mi povus denove viziti Bjalistokon, kaj momenton poste rememoris nian interparolon en la aviadilo kiu nin transportis de Varsovio al Zagrebo – ni jam tiam interparolis pri tiu ebleco! Ni – feliĉaj esperantistaj fanatikuloj!

ZDRAVKO SELEŠ

Szczęście fanatyka esperanta

Jest lato 2022. Uwolniony od uczniów i gimnazjalnych obowiązków znalazłem czas na przejrzenie zdjęć z ubiegłorocznych łowów. Jeden z ostatnich folderów pochodzi z grudnia 2021. W nim oglądam sceny z Białegostoku, dokąd zaprowadził mnie projekt Erasmus+ „Reta Edukado Nun” i gdzie miały miejsce spotkania trzech projektów podczas 22. Białostockich Dni Zamenhofa. Na najważniejszych ze zdjęć (oczywiście dla mnie, a nie dla historii!) widać mojego przyjaciela Joĉja i mnie u stóp najważniejszych na całym świecie obiektów związanych z esperantem i z Zamenhofem. Pogoda była typowo grudniowa: pochmurna i zimna, więc byliśmy ciepło ubrani – ja nawet z czapką na głowie. Ale pogoda nie wpływała na stan naszego ducha; coraz mocniej przypominam sobie, jak się czuliśmy (a przynajmniej ja). Jak chłopcy, którym spełniły się marzenia! Tak, byliśmy chłopcami, kiedy przed 45 laty zacząłem uczyć się esperanta u Joĉja i kiedy, rok lub dwa potem, założyliśmy w Āurĉevacu Esperancki Klub Białystok. Teraz nawet dla mnie brzmi to głupio: zamiast w Āurĉevacu założyć klub Āurĉevac, przyjęliśmy nazwę odległego miejsca narodzin Zamenhofa! Bo już wtedy Białystok był naszą Esperancką Mekką, Rzymem i Jerozolimą!

I oto: przypominam sobie, jak wyglądało nasze fotografowanie na niegdysiejszej ulicy Zielonej (zielona – interesujące!), gdzie kiedyś stał dom rodzinny Ludwika Łazarza Zamenhofa. Fotografowaliśmy się wzajemnie jak jacyś uczniacy albo jakieś głupiutkie dziewczątka – tylko

my nie robiliśmy selfie, ale fotografowaliśmy jeden drugiego, próbując z różnych ujęć zrobić jak najlepsze zdjęcie przed murałem z Naszym Mistrzem na balkonie drugiego piętra. Dziś wydaje mi się, że patrzył na nas z daleka trochę zawstydzony brakiem powagi ludzi w wieku poważnych sześćdziesięciu lat! Teraz w mojej pamięci pojawia się scena z przejeżdżającym kierowcą, który widział nasze fotografowanie. Wtedy pomyślałem, że właściwie wiem, co myśli: „Znowu ci zieloni fanatycy! Kto wie skąd przyjechali wielbić miejsce, gdzie stał dom tego fantasty Zamenhofa, a teraz jest tylko ta tablica i idiotyczny mural. A oni nawet nie widzą, że tędy jeżdżą samochody!”. Gdyby była z nim żona, zapewne powiedziała by tak do niej i oboje śmialiby się ironicznie!

A ja zacząłem myśleć, że przecież nie jestem jakimś tam zielonym fanatykiem (o Joćju nie można tego powiedzieć, on na podwórku swego domu postawił budynek-siedzibę Centrum Dokumentacji Esperanckiej!). Były przecież czasy, kiedy prawie porzuciłem esperanto; były lata, kiedy nie zajmowałem się esperantem, chociaż w młodości z jego powodu wiele podróżowałem, uczestniczyłem w kongresach TEJO i w przeróżnych działaniach ruchu esperanckiego. Nawet fasada mojego domu, wyobraźcie sobie, jest zielona! (Ale po prawdzie muszę przyznać, że jestem też ekologiem!). Więc gwizdząc na spojrzenia mijającego nas kierowcy: nie pozwolę jakiemuś cynikowi, żeby zniszczył moje szczęśliwe chwile – tak, u schyłku mojego aktywnego życia w końcu dotarłem do wyśnionego Białegostoku – miasto zasłużyło sobie na to, bo w nim urodził się jeden z moich największych świętych (moi „święci” są raczej świeccy niż religijni, tacy jak Erazm z Rotterdamu i Gandhi) – miasto, którego grzech nietolerancji zrodził w umyśle chłopca o nazwisku Zamenhof myśl o języku wspólnym i międzynarodowym, który pomógłby ludziom we wzajemnym zrozumieniu. Ponad dwadzieścia lat temu napisałem posłowie do esperanckiego wydania chorwackiej powieści dla dzieci „Drużyna Piotra Węzełka” Mato Lovraka, w którym zapewniałem, że świat się zmienia i upiększa ludzi, którzy nie zrezygnują ze swoich dziecięcych marzeń, no, powiedzmy – nie zdradzą siebie samych. Jeśli przeczytana na nowo powieść przywołała

we mnie szczęście, jakie odczuwałem jako chłopiec, dlaczego nie miałbym być szczęśliwy spełniając swój chłopięcy sen o pielgrzymce do Bialegostoku? Kto może mnie powstrzymać przed pozostaniem dzieckiem i uśmiechaniem się się od ucha do ucha? Wręcz chciałem dać lekcję temu kierowcy – powinien być dumny, gdyż żyje w mieście Zamenhofa i niech uczy się esperanta! Nakręciłem, w mojej głowie, nowy film: w nim pan kierowca zatrzymuje pojazd, wysiada i dobitnie pozdrawia nas: „Drodzy panowie, witajcie w mieście Zamenhofa! Czy przybyliście tu po raz pierwszy? Więc dajcie mi aparat, żebym mógł was sfotografować razem...”

I tak Joôjo i ja spacerowaliśmy po Białymstoku, zwiedzaliśmy ZEO, cieszyliśmy się spotkaniami i nowymi znajomościami, w programie kulturalnym – koncerty, prelekcje, prezentacja nowego numeru Zeszytów Białostockich, ekspozycje w Centrum im. Ludwika Zamenhofa... Naprawdę byliśmy chłopcami, którym spełniły się marzenia, a nie jakimiś zielonymi fanatykami! I tak oglądając zdjęcia i wspominając, pomyślałem sobie, że znowu mogę odwiedzić Białystok, i chwilę później przypomniałem sobie naszą rozmowę z samolotu, którym lecieliśmy z Warszawy do Zagrzebia – już rozmawialiśmy o takiej możliwości! My – szczęśliwi esperanccy fanatycy!

Z esperanta tłumaczyła Maria Niemyjska

BASHANDY TADROS

La miraĝo de la feliĉo

Abrahamo restis en sia ĉambreto en la monaĥejo en la sudo de Egiptujo. Li diris al si mem, ke „nun mi trovis feliĉon“. Li memoris sian vivon kaj kiel li studis en la universitato, sed li nur trovis miraĝon de feliĉo kun sukceso. Li laboris kaj trovis tro da doloro kaj respondeco, kun la gusto de la feliĉo. Li provis drogojn sed la feliĉo estis tro danĝera por li. Li memoris la sekslaboristinon, kiu diris al li: „Bonvolu ĉesi provadi feliĉigi min, nur ĝuu“. Lia koramikino Lajla demandis al li antaŭ 3 jaroj: „ĉu vi amas min, aŭ amas la feliĉon, kiun vi sentas kun mi?“. Abrahamo ne povis kompreni, ĉu ŝi celis seksumon kaj ne respondis. Lajla diris: „vi ne komprenos, mi ne embarasiĝas menciigi seksumon aŭ orgasmon, mi parolas pri feliĉo de la amrilato“.

Abrahamo ĉesigis siajn malpurajn rememorojn, kaj purigis sian vestaĵojn, elirante al la preĝejo. Dum la preĝo, li sentis pacon kun la longaj melismoj de la koptaj kantoj. Poste, li promenis malfrue al la manĝejo. Li aŭskultis la alian monaĥon, kiu legis el la libro „La ĝardeno de la monaĥoj“. La klarigo estas, ke li ne ĝuas la manĝaĵojn, aŭ li ĉesu pensi pri Dio.

Post similaj tagoj, la familio de Abrahamo vizitis lin. Lia patrino subtenis sian maljunan patron, kiu sidis sur rulseĝo. Lia fratino venis kun sia edzo. Alia tipo de feliĉo plenigis lian animon. Li pripensis ĉu la longa amrilato de liaj gepatroj estis feliĉo. Li tre scivolos, sed eble li neniam scios la veron. La doloro en la okuloj de liaj gepatroj, kiu estas miksitita kun

fiero pri lia fiero, pri la granda spirita decido de Abrahamo konfuzis lin. Post horoj, li revenis al sia soleco aŭ al paco, laŭ la terminoj de Abrahamo.

Vespere, li spertis kapdoloron – paco flugis el la fenestreto de lia ĉambreto. Feliĉo ne gravis tiam. Li nur volis haltigi la doloron. Li alvokis alian monaĥon, tamen, laŭ la reguloj, li devis toleri la doloron, ĉar tio estas la donaco de Dio. Post longaj horoj la donaco de la ĉeso de la kapdoloro alvenis. Abrahamo supozis, ke Dio punis lin pro lia deziro de la vivo kun la familio.

La frua sonorilo de la preĝejo rompis la pacan silentan nokton en la dezerto kaj vekis la monaĥojn. Maldekstre de Abrahamo, Tomaso promenis, kaj diris al li: „kial Dio vekigas frue?“. Abrahamo kaŝis sian rideton kaj sentis ĝojon, ĉar jen la homo, kiu povas laŭte starigadi la malpermesitajn demandojn. Samtempe li sentis sin kulpa. En la preĝejo li miras, kial li preĝas al Dio en mortinta lingvo kaj eĉ kiam li preĝas, li preĝas en oficiala lingvo. Kial li uzas la lingvon unue?

Ekster la ĉambreto, jen kato. Ĉiutage Abrahamo provas ludi kun la kato. Eble tio estas unu el la maloftaj momentoj, kiam Abrahamo ne miras pri la difino aŭ la formo de la feliĉo. Li nur ludas kaj ĝuas la tempon.

La muziko kaj la lumoj kolorigas la urbon. Okuloj kaj oreloj de la monaĥo ne toleris tion, sed sekrete li ĝuis la muzikon. Li devis eliri el la monaĥejo por aĉeti manĝaĵojn al la monaĥoj. Li ne volis reveni rapide. Li forlasis la mondon, sed ĉu la mondo forlasis lin?

„Mia patro, mi volas veki la spiritan feliĉon“, diris Abrahamo. La patro repondis: „honeste, vi estas mizerulo, mi ne sentas, ke vi feliĉas ĉi tie“. Abrahamo sentis sin ofendita kaj ekdefendis sin mem kaj sian grandan, spiritan decidon. Tamen la moko de la patro lacigis lin. Li ne povis konvinki iun ajn, ke li feliĉas.

Meditado estas la plej ŝatata agado de Abrahamo, ĉar li povas pensadi, kaj miradi sencele. Kutime, la feliĉo estas lia celo. Li havas interesajn teoriojn pri tipoj de la feliĉo, ekzemple: korpofeliĉo, animofeliĉo, spirita feliĉo. Li inventis hierarkion de feliĉoj, kaj li nun trovis la plej altan nivelon de la feliĉo.

Tagon post tago, Abrahamo preĝis, meditis, ludis kun la kato, kaj akceptadis vizitantojn. Sekrete li ekverkis sian libron pri feliĉo. Iom post iom Abrahamo ekenuis. Li komprenis, ke li bezonas muzikon, lumon, aliajn librojn kaj homojn. Li ĝuis paroli kun Tomaso, tamen Tomaso preskaŭ nur mokas la regulojn. Li volis ŝanĝon ekster la mondo de la monaĥejo.

Kiam li preĝis, li ekaŭdis la krion de bebo. Kiam li turniĝis, li ekvidis Lajla kun sia bebo. Ŝi ridetis al sia bebo kaj provis silentigi ĝin. Ŝia edzo diris al ŝi: „li malsatas”, kaj ŝi koleris, ĉar la edzo supozis, ke li estas la interpretisto de sia bebo.

„Mi enuas je ĉi tia vivmaniero, sed mi timas pri infero”. La patro diris al li: „la muroj de la monaĥejo ne protektas kontraŭ infero. Vi vivas jam en via inferno ene”. Abrahamo ankoraŭ koleris, sed li ne povis respondi.

Post jaroj, Abrahamo fariĝis la ĉefo de vendejo. Li vendis la benitan akvon, la benitan oleon, kaj aliajn benitajn aĵojn. La forto de la nova rolo feliĉigis lin. Li povis ordoni al maljunaj monaĥoj kaj paroli kun vizitantoj kaj turistoj. Li ekverkis sian duan libron: „La historio kaj la tipoj de la benoj”.

La sonorilo rompis la nokton, Abrahamo vekigis, sed anstataŭ promeni al la eklezio, li forlasis la monaĥejon. Li malaperis en la urbo. Li neniam revenis al la monaĥejo. Ĝis nun, li serĉas feliĉon alie. Denove, en la monaĥejo la sonorilo vekas la katon, Tomaso ludas kun la kato nun.

BASHANDY TADROS

Pozory szczęścia

Abraham przebywał w swojej klasztornej celi na południu Egiptu. Powtarzał sobie: „teraz odnalazłem szczęście”. Pamiętał całe swoje życie, jak studiował na uniwersytecie, ale odnalazł tylko pozory szczęścia i sukcesów. Pracował i odczuwał zbyt dużo bólu i odpowiedzialności, aby napawać się szczęściem. Próbował narkotyków, ale to „szczęście” było zbyt niebezpieczne. Pamiętał prostytutkę, która mu powiedziała: „proszę, przestań próbować mnie uszczęśliwić, tylko ciesz się”. Jego ukochana Lajla pytała go przed trzema laty: „kochasz mnie, czy też kochasz szczęście, które odczuwasz ze mną?”. Abraham nie mógł zrozumieć, czy myślała ona jedynie o seksie i próbował odpowiadać. Lajla powiedziała mu: „nie zrozumiesz, że nie zawstydzę mnie wspomnianie o seksie czy orgazmie, mówię o szczęściu jedynie z powodu odczuwania miłości”.

Abraham zostawił swoje brzydkie wspomnienia i wyczyścił ubrania, wychodząc do kościoła. Podczas modlitwy odczuwał spokój dzięki słuchaniu długich melodii koptyjskich pieśni. Potem poszedł do jadalni. Słuchał innego mnicha, który czytał księgę „Ogród mnichów”. Jego celem nie było cieszenie się jedzeniem ani zakończenie myślenia o Bogu.

Po kilku podobnie przeżytych dniach Abrahama odwiedziła rodzina. Jego matka opiekowała się swoim starym ojcem, który siedział na wózku inwalidzkim. Jego siostra przybyła ze swoim mężem. Teraz inny rodzaj szczęścia wypełnił jego duszę. Zastanawiał się, czy wieloletnia miłość rodziców jest szczęściem. Był tego ciekaw, ale chyba nigdy tego się nie

dowie. Ból w oczach rodziców połączony z dumą z jego wielkiej duchowej decyzji zmyliły Abrahama. Po godzinach spotkania powrócił do swojej samotni i spokoju, w pojęciu Abrahama.

Wieczorem poczuł ból głowy, a spokój uleciał z okienka jego celi. Szczęście wówczas nie było ważne – chciał tylko powstrzymać ten ból. Zawołał innego mnicha, lecz zgodnie z zasadami musiał tolerować ból, gdyż był on „darem” Boga. Po długich godzinach nadszedł dar zatrzymania bólu głowy. Abraham przypuszczał, że to Bóg ukarał go za chęć bycia z rodziną.

Wczesne kościelne bicie dzwonu zniszczyło spokojną, nocną ciszę na pustyni i obudziło mnichów. Z lewej strony do Abrahama podszedł Tomasz i zapytał: „dlaczego Bóg budzi się wcześniej rano?”. Abraham ukrył swój uśmiech i odczuwał radość, gdyż oto spotkał człowieka, który nie boi się głośno zadawać zabronionych pytań. Jednocześnie miał poczucie winy. Dziwił się, czemu modły w kościele do Boga odprawiane są w martwym języku, a nawet kiedy sam się modli, modli się w tej oficjalnej mowie. Dlaczego jej używa?

Pod całą pojawia się kot. Codziennie Abraham próbuje się z nim bawić. Może to jest jedna z niewielu chwil, podczas których Abraham nie myśli o definicji ani rodzajach szczęścia, tylko bawi się i potrafi się cieszyć ofiarowanym czasem.

Muzyka i światła ożywiają miasto. Oczy i uszy mnicha nie powinny ich tolerować, ale w duchu cieszył się tą muzyką. Musiał wyjść z klasztoru, aby kupić mnichom jedzenie. Nie chciał jednak szybko wracać. Opuścił swój świat, ale czy świat też go opuścił?

„Chcę pisać o swoim szczęściu, mój ojcie” – powiedział Abraham. Ojciec odpowiedział: „rzeczywiście jesteś biedakiem, nie odczuwam, że jesteś tu szczęśliwy”. Abraham czuł się obrażony i zaczął bronić siebie i swojej wielkiej decyzji duchowej. Jednak ojcowska drwina go zmęczyła. Nie potrafił nikogo przekonać, że jest szczęśliwy.

Medytacja jest ulubionym zajęciem Abrahama, gdyż może rozmyślać i dziwić się, bez określonego celu. Zwykle szczęście jest jego

celem. Ma ciekawe teorie na temat różnych typów szczęścia, na przykład szczęścia cielesnego, szczęścia duchowego. Wymyślił swoją hierarchię szczęścia i teraz odnalazł jego najwyższy poziom.

Dzień za dniem Abraham modlił się, medytował, bawił z kotem i przyjmował odwiedzających. W tajemnicy zaczął pisać książkę o szczęściu. Stopniowo jednak Abrahama zaczęła ogarniać nuda, poczuł, że potrzebuje muzyki, światła, innych książek i ludzi. Wprawdzie cieszyły go rozmowy z Tomaszem, ale ten prawie wyłącznie drwił z reguł. Chciał zmiany poza murami klasztoru.

W trakcie modlitwy usłyszał krzyk małego dziecka. Gdy się odwrócił, ujrzał Lajłę z dzieckiem, do którego się uśmiechała, próbując je uspokoić. Mąż powiedział do niej: „ono jest głodne”, ale ona się obraziła – czy mąż uważał, że to on jest tłumaczem ich dziecka?

„Nudzi mnie ten sposób życia, ale boję się piekła”. Ojciec powiedział mu: „mury klasztoru nie chronią przed piekłem. Już żyjesz w swoim wewnętrznym piekle”. Abraham wciąż się gniewał, ale nie potrafił na to odpowiedzieć.

Po latach Abraham zaczął kierować klasztornym sklepikiem. Sprzedawał wodę święconą, święte oleje i inne poświęcone przedmioty. „Ważność” tej nowej funkcji dawała mu poczucie szczęścia. Mógł rozkazywać starym mnichom oraz rozmawiać z gośćmi i turystami. Rozpoczął pisanie swojej drugiej książki: „Historia i rodzaje błogosławieństw”.

Dzwon przerwał noc. Abraham obudził się, ale zamiast pójść do kościoła opuścił klasztor. Zniknął w mieście. Już nigdy nie powrócił do klasztoru. Wciąż poszukuje szczęścia gdzie indziej.

Ponownie klasztorny dzwon obudził kota. Teraz to Tomasz z nim się bawi.

Z esperanta tłumaczył Jarosław Parzyszek



WOJCIECH BARDZIK

Libroj

Feliĉo estas plezuro sen makulita konscienco.
Sokrato

En la klubo ĉe la strato Piękna iu konigis al mi la libron de Karol May „En Kordilero”. La stato de la eldonaĵo (1947) estas sufiĉe nelegebla. La kovriroj estas difektitaj, la paĝoj estas frakasitaj kaj ne algluiĝas al la dorso, kelkaj mankas. Tamen May estas aŭtoro de libroj pri indianoj kaj la blankaj konkerintoj de Nord-Ameriko. La aŭtoro travivis malbonajn kaj bonajn tempojn – li finis sian vivon en famo. En postmilita Pollando (1951) li estis cenzurita.

Reirante al Bjalistoko per trajno mi vizitis la librovendejon Discover en la Centra Stacidomo. Iam mi decidis eviti ĝin – mi ofte lasis tie kelkdek zlotojn. Ĉi-foje mi malobeis mian decidon. Kaj kompreneble aĉetis „Serĉante la patrinon de arboj” de Suzanne Simard. Sciencistino, post mastektomio kaj kancero, post eksedziniĝo, kun du filinoj laborantaj en Brita Kolumbio, serĉas pruvojn de la inteligenteco de la arbaro. Venkante profesiajn barojn ŝi pruvas la superecon de scienca aliro al lignoadministrado super tradicio. Venkante siajn proprajn malfortojn (kun la helpo de geamikoj kaj filinoj), ŝi venkas la malsanon.

Foliumante la Interreton, mi trovas min ĉe la Eldonejo de la Jagelona Universitato (WUJ) kaj tie por la serio MUNDUS kaj la libro „Lisbono – la reĝino de maro” de Barry Hatton. Mi enamiĝis al ĉi tiu urbo dum mia ĉesto en la Universala Kongreso de Esperanto. Malgraŭ la bizaraj

(laŭ mi) hotelkondiĉoj, la homoj, kun kiuj mi estis, estis bonega ekzemplo de subteno de la maljuniĝanta viro. Estis la unua fojo, ke mi timis altaĵojn (aŭ spacon) kaj mia amikino, doninte bonajn konsilojn (kaj en kelkaj punktoj eĉ kaptinte mian manon), kondukis min trans la ponteton super la rivero Taĵo vizitante la Oceanarion. Inter esperantistoj – tio estas regulo – oni povas trovi HOMAJN POZITIVAJN REFLEKSOJN. Mi havis multajn ekzemplojn.

Pluvas trans la fenestro de la buso. Survoje hejmen de la laboro, mi sidiĝis antaŭ ŝajne normalaspekta pasaĝero. El lia buŝo la demando estas: „Ĉu ni revenas de la vernisaĝo?“. Mi surprizite rigardis la homon. Mi mem havis la ŝancon plurfoje erari, do mi respondis, ke „Nepre estas eraro“. Li metis la manon en la poŝon de la pantalono, elprenis malplenan centmililitran botelon de vodko kaj faris la geston trinki. „Malplena, ĉu vi havas eble dek zlotojn?“. Mi respondis vere, ke mi pagas per karto kaj mi ne havas kontantmonon. Li rigardis min: „Kial vivi?“. Mi sidis tie sen diri eĉ unu vorton, li daŭre babilis: „Ju diris «mi scias, ke mi nenion scias», do kial vivi?“. Alia viro de malantaŭ mia dorso aliĝas al mi, „Sinjoroj, se iu scias, ke li nenion scias, li scias multon“. Mi ne parolas. La viro kun la botelo daŭrigas sian „Kial vivi?“. „Por unue meti viajn aferojn por servi aliajn“, respondis tiu de malantaŭe. Ni alproksimiĝis al la haltejo Pastro Popiełuszko – Bieno. Mi leviĝis, diris „bonan tagon“, kaj post kiam la ŝoforo malfermis la pordon, mi eliris en la pluvon. Rapide marŝante, mi rememoris la libron kuŝantan sur la breto en la hejma biblioteko – „Sokrato. Pensoj“.

Estas du librobretoj en la ĉambro kun libroj sur la bretoj. Kelkaj el ili estas kaŝitaj en la vestoŝranko ĉar ne estis loko sur la bretoj. Aventuro, kulturo, turismumado, botaniko, filozofio, historio, sensacio, kuirado, mineralogio, ŝako, fotado... estas feliĉo povi koni la UNIVERSON.

Nur ĉi tiu ŝtormo ĉe la orienta flanko de la horizonto ne elvokas ĝojon.

La 28-a de julio 2022. Warszawa Wschodnia, mi alvenis ĉe la kajon 3 je 15.40 por „sendi“ mian filinon al Bydgoszcz de kajo 4 je 15.52. Mi ekkomprenis, ke Słowacki (trajno) foriris antaŭ mia alveno kaj Żubr

montris al mi la ruĝajn lampojn de la fino de la vagonaro. Mi veturis al la fervoja stacidomo Warszawa Centralna kaj aĉetinte bileton por 20.25 al Bjalistoko kaj manĝinte MacBurger, mi trovis min ĉe Discover. Ĉi tie min kolerigis la mikroskope eta presaĵo de la prezo de eldonaĵo de National Geographic Traveller pri Hispanio. Ĉirkaŭrigardante la tablojn plenajn de libroj, mi vidas Ulrich Nersinger...

Książki

Szczęście jest przyjemnością wolną od wyrzutów sumienia.

Socrates

W klubie przy Pięknej ktoś podzielił się ze mną książką Karola Maya „W Kordylierach”. Stan wydania z 1947 jest raczej nie do czytania. Okładki zniszczone, strony postrzępione i nie trzymają się grzbietu, niektórych brak. Jednak May to autor książek o Indianach i białych zdobywcach Ameryki Północnej. Autor przeszedł złe i dobre chwile – był złym człowiekiem, zakończył życie w sławie. W powojennej Polsce był cenzurowany.

Wracając koleją do Białegostoku na Dworcu Centralnym odwiedziłem księgarnię Discover. Kiedyś postanowiłem ją omijać – często zostawiałem tam kilkadziesiąt złotych. Tym razem złamałem postanowienie. I oczywiście jest – „W poszukiwaniu matki drzew” Suzanne Simard. Kobieta naukowiec, po mastektomii i walce z nowotworem, po rozwodzie, z dwójką córek, działająca w Kolumbii Brytyjskiej, poszukuje dowodów na inteligencję lasu. Pokonując bariery zawodowe udowadnia wyższość naukowego podejścia do gospodarki drzewnej nad tradycją. Pokonując własne słabości (z pomocą przyjaciół i córek) pokonuje chorobę.

Przeglądając internet trafiam do Wydawnictwa Uniwersytetu Jagiellońskiego (WUJ), a tam na serię MUNDUS i książkę „Lizbona królowa

mórz” Barry’ego Hattona. Zakochałem się w tym mieście podczas uczestnictwa w Światowym Kongresie Esperantystów. Mimo kuriozalnych (jak mi się wydaje) warunków hotelowych, ludzie, z którymi byłem, stanowili wspaniały przykład wsparcia starzejącego się człowieka. Po raz pierwszy odczuwałem lęk wysokości (lub przestrzeni), a koleżanka udzieliwszy dobrych rad (i w pewnych momentach nawet chwyciwszy moją rękę) przeprowadziła mnie przez kładkę nad rzeką Tag podczas zwiedzania Oceanarium. Wśród esperantystów – z reguły – można liczyć na LUDZIE POZYTYWNE ODRUCHY. Przykładów miałem wiele.

Za oknem autobusu leje deszcz. Wracam z pracy, usiadłem naprzeciw pasażera wyglądającego zdaje się normalnie. Z jego ust pada pytanie: „Wracamy z wernisażu?”. Popatrzyłem na gościa ze zdziwieniem. Sam kilkakrotnie miałem okazję pomylić się, więc odpowiedziałem że „to chyba pomyłka”. On sięgnął do kieszeni w spodniach, wyjął pustą buteleczkę po setce białej żubrówki i wykonał gest picia. „Pusta, ma pan może dziesięć złotych?”. Zgodnie z prawdą odpowiedziałem, że płacę kartą i nie posiadam gotówki. Popatrzył na mnie: „Po co żyć?”. Siedziałem nie odzywając się, on nie przestawał zaczepiać. „Ktoś powiedział «wiem, że nic nie wiem», więc po co żyć?”. Włącza się inny człowiek zza moich pleców: „Panowie, jeśli ktoś wie, że nic nie wie, to już bardzo wiele wie”. Ja się nie odzywam. Człowiek z butelką dalej swoje: „Po co żyć?”. „Po to, by najpierw uporządkowawszy swoje sprawy służyć innym”, odpowiedział ten zza pleców. Zbliżaliśmy się do przystanku Księża Popiełuszki Osiedle – wstałem, powiedziałem „miłego dnia” i po otwarciu drzwi przez kierowcę wyszedłem w deszcz. Idąc szybkim krokiem przypomniałem książkę leżącą na półce w domowej biblioteczce – „Sokrates. Myśli”.

W pokoju stoją dwie biblioteczki na półkach, na których leżą lub stoją książki. Część jest schowana w szafie, bo na półkach nie było miejsca. Przygoda, kultura, krajoznawstwo, botanika, filozofia, historia, sensacja, kulinaria, mineralogia, szachy, fotografia... szczęściem jest móc poznawać WSZECHŚWIAT.

Tylko ta burza po wschodniej stronie horyzontu nie nastraja radością. 28 lipca 2022 roku. Warszawa Wschodnia, przyjechałem na peron 3. o 15.40, by z 4. peronu o 15.52 „wysłać” córkę do Bydgoszczy. Po zrealizowaniu powyższego stwierdziłem, że Słowacki odjechał przed moim przyjazdem, a Żubr pokazał mi czerwone lampy końca składu. Przejechałem się na dworzec Warszawa Centralna i po zakupie biletu na 20.25 do Białegostoku i zjedzeniu MacBurgera trafiłem do Discovera. Tu zdenerwował mnie superdrobny druk ceny wydawnictwa National Geographic Traveller o Hiszpanii. Rozejrzawszy się po stołach pełnych książek spostrzegam Urlicha Nersingera...

Kio estas feliĉo por mi

Mi tre ŝatas rigardi ĵurnalismajn elsendojn kaj mi vidas ke feliĉo por ĉiu estas diversa. Iu oferis sian vivon al sporto, ne foriras eksteren el la sporta salono kaj la sukcesoj faras lin flugi. Alia kolektas ion, kaj se trovas tion, kio estas valora, tiam li estas feliĉa. Ankaŭ estas homoj kiuj ne laboras, ne havas revojn, interesiĝas pri nenio, sed se aĉetas drinkaĵon por si, tiam ili estas feliĉaj. Kaj tiel, kiom da homoj, tiom da difinoj por feliĉo. Mia avino diris, ke kia estas la kapablo al homo, tia estas lia hejmo. Mi povus aldoni, ke kia estas homo, tia estas lia difino por feliĉo. Nun mi komencas pensi kio estas feliĉo por mi. Feliĉo por mi estas kiam mi alvokas matene senti la odoron de kafo, farita de mia patrino. La rideto al miaj najbaroj kaj ilia „Bonan matenon” faras min feliĉa. Kanti kun radio faras min feliĉa. La feliĉo estas vojo – patrolande kaj eksterlande. Paroli kun nekonataj homoj, rideti al ĉiuj. Malfermi min al homoj kaj al la mondo, viziti muzeojn, trapasi antikvajn urbojn kaj senti tempan portalon estas feliĉo. Por mi ekzistas insulo de feliĉo, kaj tiu insulo nomiĝas Esperanto. Tiu ĉi insulo havas ĉion por esti feliĉa – vojo al la mondo, al la homoj kaj al mi mem. Tiu ĉi insulo havas muzikon, poezion, kaj amikecon. Ĝi havas kontaktojn, konatiĝajn vesperojn kaj longajn dividojn. Ĝi estas vortoj, kiuj varmiĝas, frazoj kiuj neniam forgesiĝas. Ĝi estas fenestro, kiu neniam fermiĝas, estas ponto kiu ĉiam lumiĝas por konekti kun tuta Esperantujo.

Do, kio estas feliĉo por mi? Feliĉo estas belega libro kaj kantata poeziaĵo, belaj vortoj kaj longa promenado. Varmega somero kun odoro de maroka fabela vintro, burĝona printempo kaj kolora aŭtuno. Ĝi estas

bongusta vespermanĝo kun la familio kaj geamikoj, kristnaska nokto kaj donaco pri kio revis kiel infanon kaj letero de amiko. Kio ankoraŭ estas feliĉo? Fajro, kameno kaj vino. Glaciaĵo, ĉokolado kaj amo. Rideto de infano kaj al birdoj.

Eble mi ne kalkulis ĉion, sed tio sufiĉas por ke mi estu feliĉa. Kaj vi?

Czym dla mnie jest szczęście

Bardzo lubię oglądać audycje dziennikarskie i widzę, że szczęście każdej osoby jest przewidywalne. Ktoś oddał swoje życie dla sportu, nie opuszcza hali, a sukcesy sprawiają, że unosi się w powietrzu. Inny kolekcjonuje, a gdy znajdzie coś cennego staje się szczęśliwy. Istnieją także ludzie, którzy nie pracują, nie mają marzeń, niczym się nie interesują, ale uszczęśliwia ich zakup czegoś do wypicia. I ilu ludzi, tyle definicji szczęścia. Moja babcia mawiała, że jakie umiejętności, taki dom. Możemy dodać, że jaki człowiek, taka jego definicja szczęścia. Teraz zaczynam myśleć, czym szczęście jest dla mnie. Szczęściem jest, kiedy rano wzywa mnie zapach kawy zrobionej przez moją mamę. Uśmiech moich sąsiadów i ich „dzień dobry” czyni mnie szczęśliwym. Szczęściem jest droga – w ojczyźnie i za granicą. Rozmawiać z nieznanymi ludźmi, śmiać się do wszystkich. Otwierać się na ludzi i świat, zwiedzać muzea, przemierzać starożytne miasta i poczuć portal czasowy jest szczęściem. Istnieje pewna wyspa szczęścia dla mnie, a ta wyspa nazywa się Esperanto. Na tej wyspie jest wszystko, aby być szczęśliwym – droga na świat, do ludzi i do siebie samego. Ta wyspa zawiera muzykę, poezję i przyjaźń. Zawiera kontakty, wieczory zapoznawcze i długie rozstania. Są tam słowa, które grzeją oraz zdania, których nigdy się nie zapomina. Jest oknem, które nigdy się nie zamyka, jest zawsze oświetlonym mostem łączącym z całą krainą Esperanto.

Zatem czym jest dla mnie szczęście? Szczęście to przepiękna książka i poezja śpiewana, piękne słowa i długie spacerowanie. Ciepłe lato z zapachem bajecznej marokańskiej zimy, z bogatą wiosną i kolorową jesienią. Jest smakowitą kolacją z rodziną i przyjaciółmi, bożonarodzeniową nocą z prezentem, o którym marzyło się jako dziecko i listem od przyjaciela. Czym jeszcze jest szczęście? Ogniem, kominkiem i winem. Lodami, czekoladą i miłością. Dziecięcym uśmiechem i ptakami. Może nie wymieniałam wszystkiego, ale to mi wystarcza do szczęścia. A wam?

Z esperanta tłumaczył Jarosław Banach

JINDŘIŠKA DRAHOTOVÁ

Nia domo ĉe la strato Sadova estas mia feliĉa loko

La nomon oni povas traduki kiel „Fruktoĝardena” aŭ „Parka” eĉ laŭ „Batalo ĉe Sadova”, pri tio pensis miaj francaj amikoj.

En la jaroj de pandemio mi kutimiĝis stari ĉe fenestro kaj rigardi verdan grundospaĉon inter la loĝdomoj, kiu estis nekutime senhoma, seninfana. Mi povas observi la naturon, ĝian ŝanĝiĝadon, kaj mediti. Mi loĝas ĉe teretaĝo, en domo konstruita en la jaro 1948. La domo estas el brikoj, la loĝoĉambroj estas direktitaj suden, kuirejoj, nutraĵprovizejoj kaj banejoj – norden. Norde estas koridoraj balkonoj. Loĝantoj de la unuaj kaj de la duaj etaĝoj havas la balkonojn sudodirekten, tie ofte pendas tolaĵoj por sekiĝi. Ĉiu domo havas tri enirejojn, ĉiu po ok loĝejoj. Ĉiu loĝejo havas ankaŭ propran kelospaĉon. La domo estas konstruita en „socialisma stilo”. Super la enirejoj estas emblemo bildiganta maŝininstrumentojn, ĉar la domon, kiel la tutan kvartalon, oni konstruis por laboristoj de la aŭtomobila fabriko Škoda (la fabriko post la dua mondmilito pligrandiĝis kaj nun ĝi estas pli larĝspaca ol la urbo mem). Inter la domoj estas herbejoj konvenaj por sportoj, multe da arboj, eĉ fruktaj. Antaŭ la domoj ĉe trotuaroj estas bedoj kaj arbustoj. Deketaĝaj paneldomoj elkreskis rapide kiel fungoj, laŭ planoj favoraj por hom-loĝado. Pri la domoj zorgis loĝej-oficejo. En la domoj estis por la loĝantoj diversaj ekipaĵoj por uzadi: lavmaŝinoj, gladmaŝinoj, grandega ujo kun akvo kaj ekipaĵoj por ebla katastrofo, iloj por purigi trotuaron kaj rubaĵoj. Oni hejtis per karbo kaj tapiŝojn oni purigis ekstere per

batiloj. Pli poste la loĝej-oficejo instaligis gashejtadon. Oni pagis nur malaltan luprezon.

To niesamowite jak czyjaś definicja szczęścia zmienia się w ciągu życia... Chociaż, prawdę mówiąc, ja zawsze miałem proste upodobania!

Jako dziecka nic nie cieszyło mnie bardziej niż jedzenie słodczy, zabawa na podwórku z przyjaciółmi, albo po prostu czas wolny od nauki; jako nastolatka – słuchanie muzyki jak najgłośniej bez naprzykrzania się rodziców; jako dorosłego – czytanie, spanie, cisza i spokój.

Teraz cieszę się, kiedy sprawdzam mój licznik Geigera i stwierdzam, że poziom radioaktywności na zewnątrz spadł; oznacza to, że zbliża się dzień, kiedy w końcu będę mógł wyjść z tego małego podziemnego bunkra.

Z esperanta tłumaczył Michał Mitrosz

Serçante feliçon

Entreprenante la provon trovi respondon al la demando „Kio estas feliço por mi?“, pli frue oni devas trovi respondon al la demando „Çu mi estas feliça?“. La respondo kaŭzus ĝenon, çar ne eblus klare kaj mallonge diri „jes“ aŭ „ne“.

Kutime ni starigas iun celon en la vivo kaj atingi ĝin sufiças por senti sin feliça, tamen baldaŭ aperas la demando: „Kio poste?“. Oni povas veti alian taskon, sed çu atingi ĝin estos la fino? Çu ni ne starigos al ni novajn celojn, se ni jam atingis iujn?

Povas esti, kaj ofte estas, ke ni ne atingas la celon – kaj kio sekvu? Ni povas ŝanĝi ĝin al alia kaj provi ankoraŭ denove, sed ankaŭ one povas pasive submetiĝi al la sorto kaj vivi adaptiĝante al la cirkonstancoj de la vivo.

Kiom da homoj, tiom da diversaj konceptoj de feliço. Filozofoj provis difini ĝin iel, sed iliaj ideoj por difino de la feliço estas ŝlositaj en libroj kaj en la çiutaga vivo la homoj havas sian propran koncepton. Çu feliço estas stato de daŭra kontento, çu ununura, sed unuobla verŝajna evento?

Mi estas en la aĝo nomata malbele „senila“, sed mi tre ne ŝatas tiun adjektivon. Maljunulo, laŭ la komuna kompreno, estas viro mallerta fizike kaj psike demenca, sed mi ne estas tia. Mia fizika lerteco certe estas pli malbona, eble eç multe, ol tiu de mia juneco, sed mi konservis vigelecon kaj povon por ne tre peniga laboro. Mensa demenco ne tuŝas min, danke al intelekta agado. Mi ne estas maljunulaço kaj mi volas esti nomata homo kun multe da vivsperto.

Mi interesiĝis kiel aliaj homoj komprenas feliĉon. Ege diverse. Primitiva mi trovas nomi feliĉon favora koincido aŭ kombinaĵo de cirkonstancoj. Facile akiritan riĉecon mi ne traktas kiel feliĉon. Ĉi tio estas nur signo de egoisma, materiisma sinteno al si mem kaj al aliaj homoj. Prospera destino, viva sorto, povas esti rezulto de fortuzoj kaj laboro. Tiam eble ĝi estas meritita feliĉo, sed kiam ĝi estas la rezulto de formiĝo de cirkonstancoj sendependa de la homa kontrolo, ĉu ĝi estas feliĉo aŭ hazarda predo? Post gajno de granda kvoto en loteria ludo, kontentaj ludantoj diras „Mi havis feliĉon!”. Primitiva feliĉo estas sako da mono, vilao kun baseno kaj luksa aŭtomobilo, kaj samtempe ventanimeco en la kapo. Ĝi estas feliĉo malmulte homa. Ĉu la vera feliĉo estas perlaborita sukceso per realigado de noblaj celoj kaj finiĝas far favora bilanco de vivspertoj?

La primitiva koncepto de feliĉo ĉiam estos reduktiĝi al materiaj valoroj kaj kontento kun ili. Se oni tamen entreprenas la penadon de pli profundaj intelektaj konsideroj, tiam oni eniras en la areon de religio, kaj tie la konceptoj de feliĉo estas diversaj, sed ĉiam kunligitaj kun Dio.

Ateistoj simple komprenas feliĉon kiel subjektive taksitan, plej bonan eblan vivsituation, aprezatan per mezuro de vivplezuroj. Ateistoj, kiuj analizas feliĉon pli profunde, vidas ĝin en la forto de karaktero, sendependiganta la homon de ŝanĝaj cirkonstancoj.

Interesa estas la rilato al la feliĉo de budhanoj, kiuj kredas, ke estas neeble atingi feliĉon per sekvado de deziroj, ĉar estas neeble plene satigi ilin. La sola maniero atingi konstantan feliĉon estas liberigi sin de tiuj deziroj kaj atingi la staton de nirvano aŭ la staton de libereco de ili.

Por islamanoj, feliĉo estas ligita kun teno konsenta kun la volo de Alaho. Homoj, kiuj efektivigas ĉi tiun volon, estas feliĉaj, kaj pekuloj estas malfeliĉaj, kaj en tiu ĝistempa vivo kaj post la morto. Tamen kio estas la volo de Alaho, oni ne scias, ĉar en la historio de Islamo ĝin oni trovis diverse.

Por kristanoj feliĉo, plej alta, estas nomata senpera komunikiĝo kun Dio. La fama mezepoka teologo Boethius proklamis, ke Dio estas Feliĉo

kaj homoj povas esti feliĉaj partoprenante en la feliĉo de Dio. Por la elstara teologo Tomaso de Akvino feliĉo estas la vivo de homo en ĉiela regno, al kiu oni devas alveni post la morto. Ŝajnas do, ke atingi feliĉon en ĝistempa vivo estas neeble, sed oni povas senti sin feliĉa dum sekvado de la vojo al eterna feliĉo.

Religiaj receptoj por feliĉo ne trovas multajn amatorojn. Ĉu monaĥoj fermataj en monaĥejoj sentiĝas feliĉaj? Eble ili tiel limigis siajn atendojn je feliĉo, ke ili trovas ĝin tie? El la libro „Kion la Dezertaj Patroj Povas Instrui al Ni” mi provis ellegi, kia estis la feliĉo por ermitaj monaĥoj. Ŝajnas, ke ili tiagrade limigis siajn korpan kaj spiritajn bezonojn kaj dezirojn, ke la ekzisto de tiuj monaĥoj estis feliĉo por ili. Ili vivis ĉe la fino de la antikveco, kaj hodiaŭ tia feliĉo ne povas esti imagita aŭ komprenita.

Pli ofte homo, meditanta pri la problemo de feliĉo, strebas trovi personan recepton por sia feliĉo, sed eĉ kiam li scias kia ĝi devas esti, ĝi ne efektiviĝas por li. Eĉ kiam por li ŝajnas, ke li estas feliĉa, turmentas lin zorgo por konservo de la konstanteco de feliĉo. Tiam li venas al la konkludo, ke feliĉo estas la stato de pasema kontento.

Oni ne povas eviti respondon al la demando pri sia feliĉo. Tiu demando kontinue daŭre revenas. La plej facila maniero estus diri al si, ke mi estas feliĉa hodiaŭ, ĉar mi sukcesis gravan ion. Kaj morgaŭ? Tio estos vidita en la fino de la morgaŭo. Tio estus feliĉo dividita en unutagajn feliĉajn aŭ malfeliĉajn eventojn. Tamen ie en la malproksima estonteco estus celo, al kiu tiuj eventoj proksimiĝas aŭ foriĝas. Depende ĉu ĝi estas atingebla aŭ neatingebla, ĝi generas optimismon aŭ pesimismon.

Mi, en mia aĝo, malbele nomata maljunaĝo, tamen sentas min feliĉa. Mia feliĉo ne estas tiel ĝoja kiel en la juneco. Mi ne riĉiĝis peze laborante. Mi vivis laborante ĝis la emeritiĝo, kiu tro malgranda pensio, por nun la liberan tempon, kiun mi multe havas, pasigi en vojaĝoj al distraj pensi-onoj kaj eksterlandaj ekskursoj.

Estas bonŝanco, ke mia sano iel sufiĉe bone teniĝas kaj ke en mia imago ne estas tiuspeca loko kiel hospitalo, kien ofte trafas homoj de mia aĝo. Mi adaptis hejmajn kaj distrajn agadojn al la stato de mia fizika

kondiĉo, dume mi ne nur konservis mian mensan aktivecon, sed disvolvis ĝin, ĉar emeritiĝo donis al mi pli da libera tempo.

Mi ĉiam ŝatis kaj aprezis librojn, ne ĉiujn. Mi traktis popularajn krimromanojn kaj romancojn senvaloraj. Unu fojon mi hazarde tralegis kriman romanon, kiam dum kelkaj horoj veturis per trajno. Aĉetitan ĉe la fervoja stacidomo, ĉar mi ne kunprenis mian propran libron de hejme. Post la tralego, mi lasis ĝin en la trajno, por legado fare de aliaj enuigitaj de la longa veturo. Hejme mi havas kelkajn librojn el klasika bela literaturo, multe da konsillibroj, leksikonoj, enciklopedioj, vortaroj, atlasoj, kompendioj, gvidiloj, diskoj kaj priskriboj pri temoj rilataj al miaj profesioj, sed ankaŭ kun intereso pri naturo, precipe astronomio. Altiranta min temo estas la malsuprasoraba lingvo kaj literaturo en tiu lingvo. Ankaŭ Esperanto havas ŝatindan lokon.

En la pasinteco, familia vivo kaj profesia laboro absorbis tiom da multe tempo, ke ne estis sufiĉe da tempo por libroj. Nun, sen laboro kaj nur kun mia edzino, sen mia pasinta povo por turisma migrado, mi povas ĝui la liberecon por uzi mian bibliotekon. La komputilo per interreto malfermis al mi fenestron al la mondo. Mi ĝojis pri la ebloj de virtuala rigardado ne nur de la terglobo sed ankaŭ de eliro en la kosmon konatan danke al de astronomoj. Nun, dum la emeriteco, mi havis kaj la tempon, kaj eblojn kontentigi miajn intelektajn bezonojn. Tio donas kontenton kaj tio estas mia eta feliĉo. Tio ĝojigas min kaj mi ne deziras ion plian.

Iu juna povus moke diri: „kial tio estas feliĉo!” Eble iu elpensis ian grandan feliĉon, nerealan, nur en songoj. Eble la sopira espero por tia feliĉo alportas ian momentan kontenton. Bedaŭrinde, la malfacilaĵoj de la ĉiutaga vivo memorigas, ke atendado por ĝi estas iluzia. La tempo pasas, kaj nur soifo de tia feliĉo ne sufiĉas por senti sin feliĉa. Manko de humileco por sorto kaŭzos ke tia persono ne trovos respondon por la demando „kio estas feliĉo por mi”.

Szukając szczęścia

Podjmując próbę znalezienia odpowiedzi na pytanie „Czym jest dla mnie szczęście?” trzeba wcześniej znaleźć odpowiedź na pytanie „Czy jestem szczęśliwy?”. Odpowiedź sprawiłaby kłopot, bo nie dałoby się jednoznacznie i krótko powiedzieć „tak” albo „nie”.

Zwykle stawiamy jakiś cel w życiu i osiągnięcie go wystarcza, żeby poczuć się szczęśliwym, ale zaraz pojawia się pytanie: „Co dalej?”. Można postawić następane zadanie, ale czy osiągnięcie go to będzie koniec? Czy nie będziemy stawiać sobie następnych celów, jeżeli jakieś już osiągnęliśmy?

Może być i tak, i jest tak często, że celu nie osiągniemy – i co wtedy? Można zamienić go na inny i znów próbować, ale można też pasywnie poddać się losowi i żyć przystosowując się do okoliczności życia.

Ilu ludzi, tyle różnych pojęć szczęścia. Filozofowie próbowali jakoś je zdefiniować, ale ich pomysły na określenie szczęścia tkwią zamknięte w księgach, a w codziennym życiu człowiek ma własne pojęcie. Czy szczęściem jest stan trwałego zadowolenia, czy pojedyncze, ale mało prawdopodobne zdarzenie?

Jestem w wieku określanym brzydtko jako starczy, ale bardzo mi się nie podoba ten przymiotnik. Starzec w potocznym rozumieniu to człowiek zniedołężniały fizycznie i psychicznie otepiały, a ja taki nie jestem. Moja sprawność fizyczna jest z pewnością gorsza, może nawet sporo, od tej w latach młodości, ale zachowuję ruchliwość i zdolność do niezbyt ciężkiej pracy. Umysłowa demencja nie dotyka mnie, a to dzięki aktywności intelektualnej. Nie jestem staruchem i wolę być nazywany człowiekiem o dużym doświadczeniu życiowym.

Zainteresowało mnie jak pojmują szczęście inni ludzie. Bardzo różnie. Za prostackie uznaję nazywanie szczęściem sprzyjającego zbiegu

czy splotu okoliczności. Łatwo zdobytej fortuny nie uważam za szczęście. To tylko oznaka egoistycznego, materialistycznego stosunku do siebie i innych ludzi. Pomyślny los, życiowa dola, może być rezultatem starań i pracy. Wtedy jest może zasłużonym szczęściem, ale gdy jest skutkiem układu niezależnych od człowieka okoliczności, to czy jest to szczęście, czy przypadkowa zdobycz? Po wygraniu wielkiej kwoty w grze loteryjnej zadowoleni gracze mówią: „miałem szczęście!”. Sprymityzowane szczęście to worek pieniędzy, willa z basenem i luksusowy samochód, a przy tym pustota w głowie. To szczęście mało ludzkie. Czy zatem prawdziwe szczęście jest zapracowanym powodzeniem w realizacji szlachetnych celów i kończy się korzystnym bilansem doświadczeń życiowych?

Prymitywne pojęcie szczęścia zawsze będzie sprowadzało się do wartości materialnych i zadowolenia z nich. Jeżeli jednak podejmie się trud głębszych rozważań intelektualnych to wchodzi się na teren religii, a tam koncepcje szczęścia są zróżnicowane, ale zawsze powiązane z Bogiem.

Ateiści rozumieją w uproszczeniu szczęście jako subiektywnie ocenianą, najlepszą z możliwych sytuację życiową, ocenianą miarą przyjemności życiowych. Ateiści analizujący szczęście głębiej widzą je w sile charakteru, uniezależniającej człowieka od zmiennych okoliczności.

Ciekawe jest podejście do szczęścia buddystów, którzy uważają, że nie jest możliwe osiągnięcie szczęścia przez podążanie za pragnieniami, gdyż ich całkowite zaspokojenie jest niemożliwe. Jedynym sposobem na osiągnięcie trwałego szczęścia jest więc wyzbycie się owych pragnień i osiągnięcie nirwany, czyli stanu wolności od nich.

Dla muzułmanów szczęście jest związane z postępowaniem zgodnym z wolą Allaha. Ludzie realizujący tę wolę są szczęśliwi, zaś grzesznicy nieszczęśliwi, i to tak w życiu doczesnym, jak i pośmiertnym. Czym jest jednak wola Allaha, tego nie wiadomo, bo w historii islamu różnie ją odnajdywano.

Chrześcijananie za szczęście, najwyższe, uważają bezpośredni kontakt z Bogiem. Słynny średniowieczny teolog Boecjusz głosił, że Bóg jest Szczęściem, a ludzie mogą być szczęśliwi przez uczestnictwo w szczęściu

Boga. Dla wybitnego teologa Tomasza z Akwinu szczęściem jest życie człowieka w szczęściu wiecznym w królestwie niebieskim, do którego należy trafić po śmierci. Wydaje się zatem, że osiągnięcie szczęścia w życiu doczesnym nie jest możliwe, ale czuć się szczęśliwym można, gdy podąża się drogą do szczęścia wiecznego.

Religijne recepty na szczęście nie znajdują wielu amatorów. Czy zamknięci w klasztorach mnisi czują się szczęśliwi? Może tak ograniczyli swoje oczekiwanie szczęścia, że tam je znajdują? Z książki „Czego mogą nas nauczyć Ojcowie Pustyni” usiłowałem wyczytać w czym kryło się szczęście mnichów-pustelników. Zdaje się, że tak bardzo ograniczyli swoje cielesne i duchowe potrzeby i pragnienia, że taki ich byt był dla nich szczęściem. Oni żyli przy końcu starożytności, a dzisiaj takiego szczęścia nie można sobie ani wyobrazić, ani zrozumieć.

Częściej człowiek zamyślony nad problemem szczęścia usiłuje znaleźć osobisty przepis na swoje szczęście, ale nawet gdy wie, czym ono ma być, nie spełnia się ono dla niego. Nawet gdy wydaje mu się, że jest szczęśliwy, to gnębi go troska o utrzymanie trwałości szczęścia. Dochodzi wtedy do przekonania, że szczęście to stan ulotnego zadowolenia.

Nie można uchylić się od odpowiedzi na pytanie o swoje szczęście. To pytanie będzie ciągle wracać. Najprościej byłoby powiedzieć sobie, że jestem dzisiaj szczęśliwy, bo mi się powiodło coś ważnego. A jutro? To się okaże na końcu jutra. Byłoby to szczęście podzielone na jednodniowe zdarzenia szczęśliwe albo nieszczęśliwe. Jednak gdzieś w dalekiej przyszłości byłby jakiś cel, do którego te zdarzenia zbliżają, albo od którego oddalają. Zależnie od tego, czy jest on osiągalny, czy nieosiągalny, budzi optymizm albo pesymizm.

Ja w swoim, brzydtko zwanym, starczym wieku, czuję się jednak szczęśliwy. Nie jest moje szczęście radosne jak u młodzieży. Nie dorośliem się bogactwa ciężko pracując. Przeżyłem robotnicze życie do emerytury, za małej, żeby wolny czas, którego mam teraz dużo, spędzać na wyjazdach do rekreacyjnych pensjonatów i na zagranicznych wycieczkach.

To szczęście, że moje zdrowie jako tako trzyma się i w mojej wyobraźni nie ma takiego miejsca jak szpital, gdzie często trafiają ludzie mojego wieku. Zajęcia domowe i rozrywkowe przystosowałem do stanu swojej kondycji fizycznej, natomiast aktywność umysłową nie tylko zachowałem, ale rozwinąłem, bo emerytura dała więcej wolnego czasu.

Zawsze lubiłem i ceniłem książki, nie wszystkie. Popularne powieści kryminalne i obyczajowe romanse uważałem za bezwartościowe. Raz zdarzyło mi się przeczytać kryminał, w czasie kilkugodzinnej jazdy pociągiem. Kupiony na dworcu, bo z domu nie zabrałem ze sobą własnej książki. Po przeczytaniu zostawiłem go w pociągu, niech czytają inni znudzeni długą jazdą. W domu mam trochę klasycznej literatury pięknej, dużo poradników, leksykonów, encyklopedii, słowników, atlasów, kompendiów, przewodników, płyt i opisów o tematyce związanej z moimi wykonywanymi zawodami, ale też z zainteresowaniem przyrodą, zwłaszcza astronomią. Pociągająca mnie tematyką jest język dolnołużycki i literatura w tym języku. Esperanto też ma znakomite miejsce.

Niegdyś życie rodzinne i praca zawodowa zabierały tak dużo czasu, że dla książek brakowało go. Teraz, bez pracy i tylko z żoną, bez dawniejszej kondycji do pieszych wędrówek turystycznych, mogę cieszyć się ze swobody korzystania ze swojej biblioteki. Komputer przez internet otworzył mi okno na świat. Byłem zachwycony możliwościami wirtualnego oglądania nie tylko ziemskiego globu, ale i wyjścia w poznany przez astronomów kosmos. Teraz, na emeryturze, miałem i czas, i możliwości zaspokajania intelektualnych potrzeb. To daje zadowolenie i to jest moje małe szczęście. Cieszy mnie ono i nie pragnę większego.

Ktoś młody mógłby kpiąco powiedzieć: „a cóż to za szczęście!”. Może ktoś ma wymyślone jakieś wielkie szczęście, nierealne, tylko w marzeniach. Może tęskna nadzieja na takie szczęście przynosi jakieś chwilowe zadowolenie. Niestety, trudności codziennego życia przypominają, że oczekiwanie na nie jest złudne. Czas przemija, a samo pragnienie takiego szczęścia to za mało, żeby czuć się szczęśliwym. Brak pokory wobec losu sprawi, że taki ktoś nie znajdzie odpowiedzi na pytanie: „czym jest dla mnie szczęście?”.

MÁRCIA REGO

Dek naŭ etaj feliĉoj (ne nepre en tiu ĉi ordo)

Bobeno da purpura fadeno
Littuko sekigita de l' suno
Sodakvo sur la lango
Glitado de fontoplumo
Kurado meze de pluvo
Retrovo de pasinta amo
Livero de libroskatolo
Brakumo de reta amiko
Plenumo de promeso
Kafodora ellitiĝo
Freŝbakita panbulo
Duŝo post longa trejnado
Vibradoj de violonĉelo
Bruetoj de l' infanĝardeno
Vekiĝo el koŝmaro
La plej malvarma biero
Glata surteriĝo
Sono de flua Esperanto
Alklako de „sendu“-butono

Dziewiętnaście małych szczęść (nie koniecznie w takiej kolejności)

Szpulka fioletowych nici
Pościel schnąca na słońcu
Woda sodowa na języku
Odgłos wiecznego pióra
Bieganie w deszczu
Odnalezienie dawnej miłości
Dostawa paczki z książką
Uścisk przyjaciela z internetu
Wypełnienie obietnicy
Pobudka pachnąca kawą
Świeżo upieczony bochenek chleba
Prysznic po długim treningu
Drganie wiolonczeli
Gwar przedszkola
Wybudzenie z koszmaru
Zimne piwo
Gładkie lądowanie
Brzmienie płynnego esperanta
Kliknięcie przycisku „wyślij”

Z esperanta tłumaczyła Maria Niemyjska

Du feliĉoj

Staĉjo estis la dua filo de konstruisto loĝanta en mezgranda urbo troviĝanta sur norda parto de Pollando. Li havis dek du jarojn kaj tre ŝatis veturi bicikle. La knabo havis propran biciklon, kiun li uzis ĉiuokaze kaj radiris en granda ĝardeno apud sia domo. Sabate kaj dimanĉe li vojaĝis kune kun sia patro al urba parko aŭ al proksima arbaro. Tie estis vere fascinantaj padoj kondukantaj tra montetoj kaj valoj, ĉe grandaj arboj kaj sub malalte pendantaj branĉoj. Tie li povas vidi multajn birdojn, sciurojn, de tempo al tempo leporon, aŭ eĉ kapreolon.

De kiam en la urbo oni konstruis apartajn vojojn por bicikloj Staĉjo ĉiutage veturis per la biciklo al sia lernejo. La saman lernejon iradis liaj pli aĝa frato kaj la plej aĝa fratino, sed ili preferis veturi per buso. Ankaŭ multaj gekolegoj de Staĉjo preferis busan veturadon. Li ofte ŝercis, ke lia veturado daŭras dek kvin minutojn kaj buso ankaŭ bezonas tiom da tempo, kaj li ne devas iri aŭtobusan haltejon, tie atendi buson kaj poste, post delaso de la buso, li ne devas iri piede de la alia haltejo al la lernejo. La kunklasanoj opiniis lian kielon de veturado tro laciga.

– Ni preferas komfortan kaj trankvilan iradon – ili respondis.

Post unu jaro montriĝis, ke Staĉjo estas pli vigla kaj pli sana ol liaj kolegoj. Li estis ankaŭ pli forta ol ĉiuj klasanoj krom la granda Johano. La patro de Staĉjo fieris observante liajn progresojn kaj aŭskultante laŭdojn de instruistoj pri liaj lernejoj. Same estis dum sekvaj tri jaroj. Frusomere, ĵaŭde estis la lasta labortago en la lernejo. Morgaŭ okazos solena ricevo de atestoj. Staĉjo gaje radiris lernejen, konante siajn bonajn notojn. Sur la

lasta stratkruciĝo ĝuste brilis verda signallumo kaj li ne devis bremsi. Sed samtempe de maldekstra strato rapidege proksimiĝis moderna aŭto. Juna aŭtisto ne sukcesis halti kaj la aŭto forte trafis la biciklanton, trakuris lin per la radoj kaj kun laŭta krako rompis laternan kolonon. Staĉjo ne atingis la lernejon. Li estis rapide portita al hospitalo kaj tie li pasigis somerajn feriojn. Post eliro el la hospitalo li revenis hejmen per rulseĝo. Hospitala kuracistaro verdiktis porĉiaman invalidecon pro difektiĝo de renoj kaj vertebraro. Ĉiuj konatoj diris al Staĉjo: – vi estas feliĉulo se vi pluvivis la akcidenton.

Hodiaŭ, post dudek jaroj Stanislavo plu iradas per la rulseĝo kaj trifoje en ĉiu semajno devas veturi al la hospitalo por dializo. Dume li sukcesis fini mezlernadon kaj medicinan universitaton. De tempo al tempo li rememoras sian bicikladon. Lia frato ĉijare gajnis urbestran postenon. Li ankaŭ ofte ripetis pri la feliĉo de Staĉjo. Antaŭ monato Staĉjo demandis lin:

– Ĉu vi ne estas feliĉa?

– Eble... sed tion ne facilas preparoli. Supoze mi estas, sed mia feliĉo estas alia.

Dwa szczęścia

Staś był drugim synem budowniczego mieszkającego w mieście średniej wielkości położonym w północnej części Polski. Miał dwanaście lat i bardzo lubił jeździć na rowerze. Chłopak miał własny rower, z którego korzystał przy każdej okazji i jeździł po dużym podwórzu przed domem. W soboty i niedziele jeździł z ojcem do parku miejskiego lub do pobliskiego lasu. Tam były naprawdę fascynujące ścieżki prowadzące przez wzgórza, doliny, pod wielkimi drzewami i pod nisko wiszącymi gałęziami. Można było tam zobaczyć wiele ptaków, wiewiórek, czasem zająca, a nawet sarnę.

Odkąd w mieście wybudowano osobne drogi dla rowerów, Staś codziennie jeździł na rowerze do szkoły. Jego starszy brat i najstarsza

siostra chodzili do tej samej szkoły, ale woleli jechać autobusem. Wielu kolegów Stasia również wołało jeździć autobusem. Staś często żartował, że jego droga do szkoły zajmuje kwadrans, a autobus też jedzie tak długo. Tymczasem on nie musi iść na przystanek, czekać tam na autobus, a potem po wyjściu z autobusu nie musi iść pieszo z przystanku do szkoły. Koledzy z klasy uważali, że jego sposób podróżowania jest zbyt męczący.

– My wolimy wygodną i spokojną drogę do szkoły – odpowiadali.

Po roku okazało się, że Staś jest bardziej aktywny i zdrowszy niż jego koledzy. Był także silniejszy niż inni uczniowie klasy z wyjątkiem dużego Jana. Ojciec Stasia był dumny z niego widząc jego postępy w nauce i słuchając pochwał od nauczycieli o jego ocenach w szkole. Tak było przez następne trzy lata. W końcu czerwca czwartek był ostatnim dniem pracy w szkole. Jutro odbędzie się uroczyste wręczenie świadectw. Staś znając swoje dobre oceny z radością pedałowal na swoim rowerze do szkoły. Na ostatnim skrzyżowaniu właśnie zapaliło się zielone światło sygnalizacyjne i nie musiał hamować. Ale w tym samym czasie z lewej ulicy z dużą prędkością nadjechał nowoczesny kabriolet. Młody kierowca nie zdążył się zatrzymać i samochód z wielką siłą uderzył w rowerzystę, przejechał go kołami i z głośnym hukiem wpadł na słup lampy ulicznej. Staś nie dotarł do szkoły. Szybko odwieziono go do szpitala i tam spędził letnie wakacje. Po wyjściu ze szpitala wrócił do domu na wózku inwalidzkim. Komisja lekarska szpitala orzekła trwałe inwalidztwo z powodu uszkodzenia nerek i kręgosłupa. Znajomi Stasia mówili: – Stasiu, masz szczęście, że przeżyłeś ten wypadek.

Dziś, po dwudziestu latach, Stanisław nadal jeździ na wózku inwalidzkim i trzy razy w tygodniu musi chodzić do szpitala na dializy. W międzyczasie udało mu się ukończyć liceum i studia medyczne. Od czasu do czasu wspomina swoją jazdę na rowerze. Jego brat zdobył w tym roku stanowisko burmistrza. On też często powtarzał o szczęściu Stasia. Miesiąc temu Stanisław zapytał go:

– A ty nie jesteś szczęśliwy?

– Może i jestem, ale tego nie da się określić jednym słowem. Niby jestem, ale moje szczęście jest inne.

ARKADIUSZ STOSUR

Vojo ĝis la horizonto / unu rememoro

Iam mi sidis sur la marbordo
Mi rigardis la altajn ondojn kaj la helan ĉielon
Mi fermis la okulojn pro la troa suno
La korpo malrapide bruniĝis kaj trempiĝis per salo kaj sablo
Mi verkis en mia kapo la difinon de feliĉo, kiu ne estis tre preciza kaj ampleksa

Ne gravas por amo, ke homoj konvenas proksime, sed ke ili ĉiam estas
kunaj kaj feliĉaj ĝis la fino de siaj tagoj
Nia feliĉo estas donaco de la sorto, kies evoluo dependas de ni mem
La ŝlosilo al feliĉo estas havi songojn kaj ilia realigo estas la mezuro de
nia sukceso
La ĝustaj pensoj estas feliĉo por homo kaj la garantio de bona kaj sukcesa vivo
Kelkfoje brilantaj steloj en malluma ĉielo sufiĉas por senti vin feliĉa

Poste mi denove fermis la okulojn, ekdormis skuita de la ritmo de la
junia maro
Mi revis pri pentraĵo La pentraĵo nomiĝis Soldato kaj Knabino Ridanta
aŭ: Ofiĉiro
kaj ridantino Ĝia aŭtoro estis Johano Vermeer ĉirkaŭ la jaro 1658
La pentraĵo montras la jam menciitan angulon de la ĉambro kaj paron
sidantan ĉe la tablo Soldaton kaj knabinon Sur la maldekstra flanko de
la bildo estas duonmalfermita fenestro Kaj sur muro fone granda mapo
de Nederlando Lumo eniras la ĉambron tra la fenestro

Ĝi lumigas la knabinon dum la viro restas en la ombro Lia vizaĝo estas nur parte videbla

Li sidas kun la dorso turnita al la spektanto Li alfrontas la knabinon antaŭ si Ŝi ridas kaj tenas glason en la manoj La kapo de la viro estas preskaŭ duoble pli granda ol tiu de la knabino, kvankam ambaŭ sidas proksime unu al la alia.

La kunmetaĵo mem estas relative ofta en nederlanda ĝenropentraĵo Sed Vermeer uzas ĝin por pruvi la majstrecon labori kun lumo kaj spaco La loko de la personoj pliigas la efikon de profundo kaj donas intiman humoron al la bildo La proksimeco kaj sinteno de la herooj kiuj distingas la temajn verkojn de Vermeer disde aliaj realismaj artistoj La pentraĵo estas esprimo de la arto kaj majstrado de Vermeer en laborado kun lumo La ĉeffiguro estas banita en varma lumo kiu fluas tra la malfermita fenestro La vizaĝo kaj kapvestaĵo de la knabino kontrastas kun la malhelaj manikoj de ŝia robo kun sunaj reflektaj.

Eble ĉi tio estas bildo de maturiĝanta feliĉo? Subite, malvarma objekto komencis tikli miajn piedojn Kiam mi malfermis la okulojn, mi vidis grandan botelon el dika verda vitro kun papero ene Mi malŝtopis ĝin ne facile kaj eklegis iomete flaviĝintan pergamenon...

Mi eĉ ne scias kien ĉi tiu vojo kondukas
eble daŭras la lasta vespermanĝo signo
de la interligo kiam la horloĝo ankoraŭ tiktakas
kaj ne estas signifoj aŭ sencoj de la vojaĝo

ne demandu vi neniam scios
ĝusta respondo
ĉar eble feliĉo ne ekzistas
sed kiam oni rigardas dormantan
infanon, altan arbon
penseman katon kurantan sciuron

susuran akvofalon falantan
neĝon la arkitekturon de la brilanta formikejo

en la oranĝa suno
arĝentaj trutoj forglitantaj
de sub la sukkena hoko
buksaj pecetoj

tiam vi havas dubojn
sed vi neniam scios la veron
vi ne fariĝos fieraj esploristoj
vi ne povas defendi aferojn mem

la altan kastelon de racio
kontraŭ la sovaĝa invadanto de la imago
ho tiom da signoj tiom da mirakloj
magioj en ĉiu horo de la tago

ĉe tagiĝo, la birdoj brosas la herbojn
zorge elektu la pinglojn
matene la speguloj rompiĝos kaj ni kalkulos
gratas ĉiun linion la pordo malfermiĝos

kaj aero eniros niajn hejmojn
fajro kaj akvo estos invititaj la tero tremos
kaj nenio fariĝos la akraj bordoj de racio
altaj ondoj de pasio batos restas

spuri la nebulon de la matena suno
pluvajn posttagmezojn oceanojn flakojn
la plezuro trinki gutojn
de akvo el puto en varma tago

ĉu la dioj donus al ni alian
la tempo de la jaro aŭ tiu, kiu pleje
restos la lasta pikas nian memoron per brakumo per kiso per tuŝo
ne, vi ne povas atendi morgaŭ, estas hodiaŭ

retenu la esperon kaj la malespero samtempe
danci kanti froti la korpon per oleo
trinku la vinon en la tasojn rigardu kiel kuri
tempo ĵaluza al nekonata direkto

la vojo al la horizonto tra la kampoj de maturiĝantaj cerealoj,
la maroj de ekverdaj herboj, la sedimentoj de densaj arbaroj,
makuloj de lagoj, ĝuu kaj pluku ĉiun tagon kiel maturan frukton
laŭ la konsilo de Horacio, ne atendu kuru

kuru estas via tempo ne atendu ne atendu ne atendu
ĝis morgaŭ estas hodiaŭ malfermu viajn okulojn
ne diru eĉ unu vorton ĉar estas tiom da signoj ĉi tie
tiom da malplenaj lokoj tiom da fajroj, kiuj brulas per hela flamo...

El la pola tradukis Paweł Dzienis

Droga po horyzont / jedno wspomnienie

Pewnego dnia siedziałem nad brzegiem morza
Patrzyłem na wysokie fale i jasne niebo
Przymykałem oczy z nadmiaru słońca
Ciało powoli nabierało brązowej barwy i nasączało się solą i piaskiem
Układałem w głowie definicję szczęścia niezbyt precyzyjną i rozbudowaną

Dla miłości nie jest ważne aby ludzie do siebie ściśle pasowali ale by byli zawsze razem i byli szczęśliwi aż do końca swoich dni
Nasze szczęście to prezent od losu którego rozwijanie zależy od nas samych
Kluczem do szczęścia jest posiadanie marzeń a ich realizacja jest miarą naszego sukcesu
To właściwe myśli są szczęściem dla człowieka i gwarancją dobrego udanego życia
Czasem wystarczają jaśniejące gwiazdy na ciemnym niebie aby poczuć się szczęśliwym

Potem znów przymknąłem oczy, przysypałem kołysany rytmem czerwonego morza
Śnił mi się obraz Obraz nazywał się Żołnierz i śmiejąca się dziewczyna albo: Oficer
i roześmiana dziewczyna Jego autorem był Jan Vermeer w okolicach 1658 roku

Obraz przedstawia wspomniany już kąt pomieszczenia i siedzącą przy stole parę
Żołnierza i dziewczynę Z lewej strony obrazu znajduje się uchylone okno A na ścianie w tle wielka mapa Holandii Przez okno wpada do pomieszczenia światło
Ono oświetla dziewczynę mężczyzna natomiast pozostaje w cieniu Jego twarz jest widoczna tylko częściowo Siedzi odwrócony plecami do widza Zwrócony jest w stronę dziewczyny która znajdującej się naprzeciw niego Jest roześmiana trzyma w rękach kieliszek Głowa mężczyzny jest niemal dwa razy większa od dziewczyny choć oboje siedzą blisko siebie Sama kompozycja jest stosunkowo powszechna w holenderskim malarstwie gatunkowym
Ale Vermeer używa jej do wykazania się opanowaniem pracy ze światłem i przestrzenią Lokalizacja postaci zwiększa efekt głębi i nadaje intymny nastrój obrazowi To właśnie bliskość i postawa bohaterów odróżnia prace

tematyczne Vermeera od innych realistycznych artystów Obraz jest wyraz kunsztu i mistrzostwa Vermeera w pracy z oświetleniem Główny bohater jest skąpany w ciepłym świetle, które przepływa przez otwarte okno Twarz i nakrycie głowy dziewczyny kontrastują z ciemnymi rękawami sukienki ze słonecznymi refleksami.

Może to jest obraz dojrzewającego szczęścia? Nagle moje stopy zaczęły łaskotać zimnym przedmiotem Gdy otworzyłem oczy zobaczyłem dużą butelkę z zielonego grubego szkła z kawałkiem papieru wewnątrz Odkorkowałem ją nie bez trudu i zacząłem czytać lekko pożółkły pergamin...

Nawet nie wiem dokąd ta droga zmierza
może trwa ostatnia wieczerza znak
przymierza kiedy zegar wciąż czas odmierza
a znaczeń i sensów wędrówki brak

nie pytaj nigdy nie poznasz
właściwej odpowiedzi
bo może szczęście nie istnieje
ale gdy patrzysz na śpiące

dziecko wysokie drzewo
zamyślonego kota biegnącą wiewiórkę
szeleszczący wodospad prószący
śnieg architekturę mrowiska lśniącego

w pomarańczowym słońcu
srebrnego pstrąga wymykającego się
spod bursztynowego haczyka
bukszpanowego wędzidła

wtedy masz wątpliwości
lecz nigdy nie poznasz prawdy
nie zostaniesz dumnym odkrywcom
rzeczy samych w sobie nie obronisz

wysokiego zamku rozumu
przed dzikim najeźdźcą wyobraźni
ach tyle znaków tyle cudów
czarów w każdej godzinie dnia

o świecie ptaki cheszają źdźbła trawy
wydłubują troskliwie igliwie
rano pękają lustra a my policzymy
każdą kreskę rysy otworzą się drzwi

i powietrza wejdą do naszych domów
zaproszą ogień i wodę zatrząsie się ziemia
i nic się nie zmieni w ostre wybrzeża racjonalności
uderza wysokie fale namiętności pozostanie

śledzenie słoneczne mgły poranka
deszczowych popołudni oceanów kałuż
przyjemność sączenia kropel
wody ze studni w upalny dzień

czy zatem bogowie podarują nam kolejną
porę roku czy ta pozostanie ostatnią która najbardziej
ukłuje nam pamięć uściskiem pocałunkiem dotykaniem
nie ty nie możesz czekać na jutro ono jest dziś

powściągnij nadzieję i rozpacz jednocześnie
tańcz śpiewaj oliwą natrzyj ciało
sącz wino w puchary patrz jak biegnie
czas zazdrosny w niewiadomym kierunku

drogą po horyzont przez łąny dojrzewających zbóż
morza zieleniejących traw osady gęstych lasów
plamy jezior każdy dzień zrywaj jak dojrzały owoc
za radą Horacego nie czekaj nie zwlekaj biegnij

biegnij to twój czas nie czekaj nie czekaj nie czekaj
jutra ono jest dzisiejszym dniem otwórz oczy
nie mów ani słowa bo przecież tyle jest tutaj znaków
tyle pustych miejsc tyle ogni które się palą jasnym płomieniem...

Nuboj

Grizaj. Malvarmaj. Solecaj. La tagoj pasas nerimarkeble, senfina buklo, nenio ŝanĝiĝas. Mi rigardas tra la fenestro, la nuboj denove kovras la sunon. Vento malfermas mian fenestron, malvarmigas miajn ostojn. Mi ellitiĝas por fermi ĝin, la kvaretaĝa guto flustras mian nomon deloge. Mal-supre, la senfoliaj arboj etendas siajn mortajn branĉojn al ĉielo sen merloj.

Mi denove enlitiĝas, enterigante min sub monton da littukoj. *Mi devas voki la teknikiston.* La hejtado ankoraŭ estas rompita. Mi snufas. Mia kapo doloras. Mi etendas mian manon por preni mian poŝtelefonon. *Damne.* Mi forgesis enŝalti ĝin hieraŭ nokte. Apud la plilongiga ŝnurkonduktilo, la malplena botelo de dormigaj piloloj ridas de mi. Ne estis eĉ unu nokto, kiam ili efikis.

Mi metas la manon sub la kusenon, palpante la molecon de la felo. *Nenio.*

Mi malfermas la okulojn subite. Mia koro saltas baton. Mi ellitiĝas tro rapide, mi kapturiniĝas, sen tempo por pensi pri io alia ol mia lito. Tro malplena, tro malvarma. Mi ĵetas la littukojn supren en la aeron, forĵetas la kusenon. Ĉio sen rezulto: *mi ne povas trovi ĝin.*

Subite, la ĉielo aspektas pli griza kaj la tago estas pli malvarma. La amaso de malpura vestaĵo en la angulo de mia ĉambro mokas min, memorigante min kiel soleca mi estas. Mi vidas ĉirkaŭ mi velkintajn plantojn, mortigitajn de mia neglektemo. Polvomakuloj, kiuj brilas sub la radioj de suno, kiu ne povas varmigi la mondon. Taso da malvarma kafo, kiu estis duone malplena dum semajno. La monto de nelegitaj libroj estas tro peza.

Soleco ege malfaciligas al mi spiri kaj mi komprenas kiel Atlaso sentas sin ĉiutage.

Freneze, mi serĉas ĝin ĉie. Sukeraĵaj envolvaĵoj kaj malpuraj teleroj. Kvitancoj por aĉetoj kiujn mi ne memoras. Vestaĵoj, kiujn iu mortinta versio de mi kutimis ami. Mi fosas tra tavoloj de vivoj, kiuj ne plu apartenas al mi, serĉante la nuran aferon, kiu tenas miajn okulojn malfermitaj. La nura pruvo, kiun mi havas, ke ĝi estis reala...

Kun tremantaj manoj, mi kaptas mian malnovan poŝtelefonon. Miaj frostigitaj fingroj trakuras la rompitan ekranon. Mi relegas denove la mesaĝojn, kiujn mi ne kapablas forviŝi. La sentoj, kiuj daŭre tranĉas mian koron. De ĉi tiu kvara etaĝo, mi memoras ĉion.

Nostalgio metas siajn fingrojn en mian buŝon kaj devigas min rideti, okuloj plenaj de larmoj. Nostalgio estas boao, ĝi kunpremas min, malhelpas profunde enspiri. Nostalgio igas min skribi mesaĝon, kiun mi ne sendas, flustras la vortojn al mia orelo, devigas min forigi ĝin je la lasta sekundo. Nostalgio eltrovas la memorojn.

Kiam la ĉielo estis blua kaj la suno brilis alte. Rememoroj kie la varma vento movis la verdajn foliojn de la arboj, plenaj de floroj, la maro respegulas mil kolorojn ĉiun sunsubiron. Kiam la kanto de la merloj vekis nin. Nostalgio vidas mian liton en malordo kaj helpas min serĉi ĝin. Nostalgio ne povas akcepti, ke ĝi ankaŭ ne estas ĉi tie.

Ĉiun sekundon nova memoro aperas. Sidante en la verda herbo, vico da formikoj portantaj provizojn reen al sia nesto. La blankaj nuboj super niaj kapoj, via mano indikanta ilin. Tiu nubo, kiu aspektis kiel kuniklo. La demando, kiun vi faris al mi, tiu, kiun mi ne povis respondi.

Kio estas feliĉo por mi?

Mi memoras, ke mi sidis en la verda herbo, roso trempis mian pantalonon. Dum vi rigardis la ĉielon, vian kotonan zoon, mi ne povis deturni miajn okulojn de via rideto.

Kio estas vi por mi?

Nostalgio rezignas antaŭ ol mi. Nostalgio preferas vivi en forpasintaj lumjaroj. Nostalgio diras, ke ĝi estas pli dolora, sed tiu doloro estas ĝia plej ŝatata gusto. Mi tamen ne povas rezigni. Mi daŭre serĉas ĝin.

Mi vidas sub la lito, lastan lokon, mian lastan esperon. Polvo kaj malpuraj ŝuoj salutas min. Per la poŝlampo de mia poŝtelefono mi lumigas tiun forgesitan lokon. Mi retenas la spiron, kvazaŭ tio estus la ŝlosilo de magio, senkonscia preĝo. La planko estas malvarma.

Mi etendas mian manon, kroĉiĝante al mia trovo kiel ŝiprompulo al la restaĵo de sia ŝipo. Miaj fingroj fosas en la molan felon de la pluŝ-kuniklo, kiun vi faris por mi. Mia menso revojaĝas al tiu posttagmezo, verda herbo kaj via rideto. Teni ĝin en miaj manoj sentas kiel brakumo. Havi ĝin ĉirkaŭe sentas kiel vidi vin rideti.

Buntaj. Varmaj. Afablaj. La tagoj pasas kaj viaodoro malaperas de la pluŝ-besto. Mi rigardas tra la fenestro, imagante, ke la flugantaj merloj estas aviadiloj. La unuaj folioj eliris sur la branĉojn, la unuaj burĝonoj leviĝis al la ĉielo. La porda sonorilo sonoras.

Mi malfermas la pordon, laca rideto sur la vizaĝo. Vi lasas vian valizon sur la planko, herbajn makulojn sur viaj pantalonoj. En mia mano, la kuniklo, kiu malsuprenigis vin de la ĉielo.

Mi pensas, ke vi jam scias, kio estas mia respondo.

Chmury

Szare. Zimne. Samotne. Dni mijają niezauważenie, niekończąca się pętla, nic się nie zmienia. Wyglądam przez okno, chmury znowu zakryły słońce. Wiatr otwiera okno, chłodzi moje kości. Wstaję z łóżka, aby je zamknąć, kropla z czwartego piętra szepce bałamutnie moje imię. Niżej bezlistne drzewa wyciągają swoje obumarłe gałęzie do nieba, w którym nie latają kosy.

Znów wślizguję się do łóżka, zakopując się pod stosem koców. *Muszę wezwać fachowca.* Ogrzewanie znów nie działa. Pociągam nosem. Boli mnie głowa. Wyciągam rękę, aby wziąć komórkę. *Do diabła!* Zapomniałam ją naładować wczoraj w nocy. Obok przedłużacz, pusta butelka po pigułkach nasennych śmieje się ze mnie. Żadnej nocy nie pomogły.

Wkładam rękę pod poduszkę, szukając palcami miękkiego futerka. *Nic.*

Nagle otwieram oczy. Moje serce bije szybko. Opuszczam łóżko zbyt szybko, kręci mi się w głowie, za szybko, aby myśleć o czym innym niż moje łóżko. Zbyt puste, zbyt zimne. Rzucam nakrycia do góry, wyrzucam poduszkę. Wszystko bez rezultatu: *nie mogę tego znaleźć.*

Nagle niebo zdaje się bardziej szare, a dzień zimniejszy. Kupa brudnych ubrań w kącie pokoju kpi ze mnie, przypominając jaka jestem samotna. Widzę wokół siebie zwiędłe rośliny, bez życia, z powodu mojego niedbalstwa. Plamy kurzu widoczne w promieniach słońca, które nie może ogrzać świata. Filiżanka zimnej kawy od tygodnia stoi w połowie pusta. Góra nie czytanych książek jest zbyt ciężka.

Samotność utrudnia mi oddychanie i teraz rozumiem, jak czuł się codziennie Atlas.

Szaleńczo szukam tego wszędzie. Papierki po cukierkach i brudne talerze. Paragony za zakupy, których nie pamiętam. Ubrania, które jakaś obumarła wersja mnie miała zwyczaj kochać. Kopię w warstwie żyć, które już nie należą do mnie, szukając jedynej rzeczy, która sprawia, że moje oczy wciąż są otwarte. Jedyne dowód, jaki mam na moją realność...

Drżącymi rękami chwytam stary telefon komórkowy. Moje zmarznięte palce przebiegają rozbity ekran. Na nowo czytam wiadomości, których nie umiem skasować. Uczucia, które wciąż ranią moje serce. Od tego czwartego piętra pamiętam wszystko.

Tęsknota wkłada swoje palce w moje usta i zmusza je do uśmiechu. Oczy pełne łez. Tęsknota jest jak wąż boa, ściska mnie, utrudnia głęboki oddech. Tęsknota skłania mnie do pisania wiadomości, której nie

wysyłam, szepce w moje uszy słowa, które w ostatniej chwili wymazują. Tęsknota wynajduje wspomnienia.

Kiedy niebo było niebieskie, a słońce świeciło z wysoka. Wspomnienia o ciepłym wietrze poruszającym zielone liście drzew, kwiatów, morze odzwierciedlające tysiące kolorów podczas każdego zachodu słońca. Kiedy śpiew kosów budził nas. Tęsknota widzi moje nieuporządkowane łóżko i pomaga mi tego szukać. Tęsknota nie chce zaakceptować, że i tu tego nie ma.

W każdej sekundzie pojawia się nowe wspomnienie. Siedząc na zielonej trawie widzę rząd mrówek niosących zaopatrzenie do swojej siedziby. Białe chmury ponad naszymi głowami, twoja ręka pokazująca je. Ta chmura wygląda jak królik. Pytanie, które mi zadałeś, na które nie mogłam odpowiedzieć.

Czym dla mnie jest szczęście?

Pamiętam, że siedzieliśmy na zielonej łące, rosa zmoczyła mi spodnie. Tymczasem ty patrzyłeś w niebo, nie mogłam oderwać oczu od twojego uśmiechu.

Czym ty jesteś dla mnie?

Tęsknota rezygnuje wcześniej niż ja. Tęsknota woli żyć przeszłością. Tęsknota mówi, że jest bardziej bolesna, ale ten ból to jest jej ulubiony smak. Ja nie mogę jednak zrezygnować. Wciąż tego szukam.

Zaglądam pod łóżko, ostatnie miejsce, moja ostatnia nadzieja. Kurz i brudne buty witają mnie. Oświetlam to zapomniane miejsce lampką telefonu komórkowego. Wstrzymuję oddech, jakby to miał być klucz do magii, nieświadoma modlitwa. Podłoga jest zimna. Wyciągam rękę chwytając znalezione jak rozbitek resztkę statku. Moje palce grzebią w miękkim futerku pluszowego królika, którego zrobiłeś dla mnie. Umysł wraca do tego popołudnia, zielonej trawy i twojego uśmiechu. Trzymać go w rękach to jakby obejmować ciebie. Mieć go obok siebie to jakby widzieć ciebie uśmiechającego się.

Wielobarwne. Ciepłe. Miłe. Dni mijają, a twój zapach na pluszowym zwierzątku zanika. Patrzą przez okno i wyobrażam sobie, że fruujące

kosy to samoloty. Pierwsze liście pojawiają się na drzewach, pierwsze pączki unoszą się do światła. Słysząc dzwonek do drzwi.

Otwieram drzwi, zmęczony uśmiech na twojej twarzy. Stawiasz walizkę na podłodze, plamy z trawy na twoich spodniach. W mojej ręce zajaczek, którego zdjąłeś dla mnie z nieba.

Myszę, że już znasz moją odpowiedź.

Z esperanta tłumaczyła Dorota Helena Burchardt



ENHAVO · SPIS TREŚCI

Anna Kokot-Nowak

La lecionoj de feliĉo (1-a premio) · 5

Fakultety ze szczęścia (I nagroda) · 8

Maria Rosaria Spanò

Geometrio (1-a premio) · 11

Geometria (I nagroda) · 14

Hanna Shykuts

Esti survoje (3-a premio) · 18

Być w drodze (III nagroda) · 20

Monika Czarnowska

Feliĉa-malfeliĉa homo (*distingo*) · 22

Szczęśliwy-nieszczęśliwy człowiek (*wyróżnienie*) · 25

Bartosz Dłubała

Feliĉo (*distingo*) · 28

Szczęście (*wyróżnienie*) · 30

Anna Józwicka

Bilancio de la vivo (*distingo*) · 32

Bilans życia (*wyróżnienie*) · 34

Andrzej Liczmonik

Demando (*distingo*) · 36

Pytanie (*wyróżnienie*) · 40

Jorge Rafael Nogueras

Eĉjo, mia feliĉo (*distingo*) · 44

Eĉjo, moje szczęście (*wyróżnienie*) · 45

Zdravko Seleş

Feliĉo de esperanta fanatikulo (*distingo*) · 46

Szczęście fanatyka esperanta (*wyróżnienie*) · 49

Bashandy Tadros

La miraĝo de la feliĉo (*distingo*) · 52

Pozory szczęścia (*wyróżnienie*) · 55

Wojciech Bardzik

Libroj · 59

Książki · 61

Rumyana Budinova

Kio estas feliĉo por mi · 64

Czym dla mnie jest szczęście · 65

Jindřiška Drahotová

Nia domo ĉe la strato Sadova estas mia feliĉa loko · 67

Nasz dom przy ulicy Sadowej jest moim szczęśliwym miejscem · 70

Toni Espinosa

Kiam la monstroj paneas · 74

Kiedy potwory wpadają w chandrę · 77

Blanka Hužerová

Kio estas feliĉo? · 81

Czym jest szczęście? · 82

Henryk Liszkiewicz

La feliĉo egalas al granda mono · 85

Szczęście, czyli wielkie pieniądze · 87

Jorge Rafael Nogueras

La iama magio · 89

Dawna magia · 92

Jorge Rafael Nogueras

Simplaj ŝatoj · 97

Proste upodobania · 97

Stanisław Polanowski

Serçante feliçon · 99

Szukając szczęścia · 103

Márcia Rego

Dek naŭ etaj feliçoj (ne nepre en tiu çi ordo) · 107

Dziewiętnaście małych szczęść (nie koniecznie w takiej kolejności) · 108

Wacław Rekowski

Du feliçoj · 109

Dwa szczęścia · 110

Arkadiusz Stosur

Vojo ĝis la horizonto / unu rememoro · 112

Droga po horyzont / jedno wspomnienie · 115

Diana Griselda Valdovinos Nájera

Nuboj · 120

Chmury · 122

